


# ESPERANTO

SEPTEMBRO 1962

55a Jaro - N-ro 681 (9)

# esperanto

SEPTEMBRO 1962

55a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 681 - (9)

*Fondinto :* H. HODLER

**Ĉion por la redakcio** oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

**Ĉion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ĉiu materialo por difinita numero** devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A. :**
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Traduko kaj represo** de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

**Jara abono (1962) :** 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj :**
1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

**Anoncetoj pri korespondado :**
0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en pli ol 80 landoj.**

**Estraro de U.E.A. :**

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

**LA FRONTPAĜA BILDO :**

Kvieta momento; la kutima oratora viglo transformiĝas al trankvila klarigo dum la Festparolado de Prof. Ivo Lapennna.

## Enhavo

La Nova Estraro . . . . . . . . . 145
Decida Kongreso (Festparolado) . . . 146
La Solena Inaŭguro . . . . . . . . 149
La Du Kongresoj . . . . . . . . . 150
La Ĝeneralaj Kunvenoj . . . . . . . 150
Teatraj Eventoj . . . . . . . . . . 152
Premioj kaj Diplomoj . . . . . . . 154
Grava Financa Subteno . . . . . . . 154
Dumkongresaj laboroj de la Komitato kaj Estraro . . . . . . . . . . . 156
Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj . . 158
Aliaj eventoj . . . . . . . . . . . 159
Cirkuleroj . . . . . . . . . . . . . 160
La Scienca Konferenco . . . . . . . 161
La Solena Fermo . . . . . . . . . 162
Pensoj pri la Internacia Diplomo . . . 163
Letero al Ada Fighiera-Sikorski . . . 164

*Rubrikoj*

La Internaciaj Konkursoj . . . . . 164
Oficiala Informilo . . . . . . . . 165

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# LA NOVA ESTRARO

La nova Estraro de UEA, unuanime elektita de la Komitato, signas novan epokon en la evoluo de nia movado. La decida naturo de la Kongreso, la multaj pozitivaj ideoj diskutitaj en la Komitato kaj komisionoj, la alpreno de la Dua Baza Laborplano, kaj multaj aliaj aferoj; ĉiuj kulminis en la elekto de Estraro, kiu povos plenumi la volon de la Komitato kaj la membroj, kaj kiu scias, ke en ĝia laboro ĝin plene subtenos la Komitato, la aliĝintaj asocioj, la lokaj grupoj, la individuaj membroj kaj ĉiuj elementoj kiuj kune konsistigas UEA.

**La Estraranoj** (kaj iliaj apartaj taskoj) estas : - PREZIDANTO *Prof. D-ro Hideo Yagi* (Aziaj problemoj; Oriento-Okcidento). VICPREZIDANTOJ *S-ro H. W. Holmes, O.B.E.* (Teknikaj prezidaj taskoj; Londona konto). *S-ro E. L. M. Wensing.* (Rilatoj kun industrio kaj komerco). ĜENERALA SEKRETARIO *Prof. D-ro Ivo Lapenna,* (Eksteraj rilatoj; lerneja kampanjo; UNESKO; CED). ESTRARANOJ *D-ro A. Albault* (Kulturaj Aferoj; Kongresoj). *S-ro Z. Czuba,* (Landaj kaj fakaj asocioj; delegitoj). *S-ro E. J. Woessink,* (Financo kaj Administrado). *S-ro Sv. Ziegler,* (Informado, Raportoj, Protokoloj, Korespondado).

Laŭ tradicio, ĉiu estrarano, aldone al ĝenerala respondeco, havas sian apartan taskon. Zorge dividinte la laboron kaj malŝarĝinte la Ĝeneralan Sekretarion oni certigis bonan plenumon de ĉiuj taskoj. Antaŭ ĉio la Estraro estas laborkomitato kaj ĉiu ano, ne nur montris sian kapablon per bona laboro por la movado, sed ankaŭ per sukceso en la propra profesio. Inter si la estraranoj posedas en alta grado lingvajn, organizajn, financajn, kulturajn, juristajn, komercajn kaj sciencajn talentojn.

La Estraro plue simbolas la universalecon kaj neŭtralecon de la Asocio. Principe oni elektas estraranon ekskluzive pro lia kapablo helpi la movadon, sen atento al liaj opinioj aŭ deveno. En ĉi tiu Estraro, tamen, estas Aziano kaj Eŭropanoj, anoj de diversaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj, de diversaj kredoj kaj profesioj. La Estraro, tial, estas en bona pozicio plenumi sian neŭtralecon per interŝanĝo de ideoj. Tiu, nia neŭtraleco, estas grava; ĝi ne estas nura indiferento, sed pozitiva komprenemo kaj toleremo esencaj en tuthomara movado.

El prestiĝa vidpunkto, kaj Prof. Yagi kaj Prof. Lapenna estas mondkonataj en siaj fakoj kaj S-ro Wensing, Direktoro de la Elektromedicina fako de Philips, estas vere influa en industriaj rondoj.

Inter la estraranoj, Prof. Yagi, S-ro Holmes, Prof. Lapenna kaj S-ro Woessink, estas jam spertaj en la Estraro. Kvar estas novaj. S-ro Wensing, jam menciita, antaŭe aktivis en Nederlando; D-ro Albault, delonge Komitatano de UEA, estas Akademiano, gvidanto de la Terminologia Centro de UMEA; S-ro Czuba estas ĝenerala sekretario de la Pola Esperanto-Asocio; S-ro Ziegler estas Sekretario-Kasisto de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj kaj Estrarano de CDEL.

La plej grava faktoro tamen estas, ke Prof. Lapenna restas en sia pilota pozicio. Lia bonfamo inter la Esperantistoj, pro lia oratora talento, organiza kapablo kaj penetra intelekto, estas tia, ke apenaŭ necesas lin prezenti. Tamen, nur ni, kiuj havis la honoron labori kun li en la Estraro kaj en CED, povas plene aprezi lian dinamikon, lian fulmrapidan sed persistan, daŭran laboron kaj lian senliman entuziasmon por nia afero. Nur tiuj kiuj pli intime konas lin, plene konstatas kiel li laciĝis korpe kaj psike en nia servo. Tial ni estu dankaj, ke la unuanima lojaleco de la Komitato, la subteno kaj ŝato de la ordinaraj Esperantistoj kune persvadis lin repreni sian pezan taskon.

En la nova Estraro triumfas la kolektiva saĝo kaj volo de la membroj de UEA. Malantaŭ ĝi ni ĉiuj kune marŝu al plena sukceso por nia, tiel grava, afero.

*Norman R. Smith*



*PROFESORO D-RO HIDEO YAGI, LA NOVA PREZIDANTO DE UEA naskiĝis en 1899. De 1934 li estis Profesoro de Ginekologio en Okayama Universitato kaj en 1959 fariĝis ĝia Rektoro. En 1956 li fariĝis estrarano de la Internacia Federacio de Ginekologio kaj Akuŝscienco, Ĝenevo, kaj en 1961 estis elektita Vicprezidanto de tiu Federacio. En 1957 li estis elektita Prezidanto de la Azia Ginekologia Asocio, Tokio. Li fariĝis profesoro emerita en 1962 kaj estas nun Direktoro de la Kancera Instituto, Okayama.*

*En 1959 li fariĝis Prezidanto de la UNESKO-Asocio de Okayama.*

*Li estas Esperantisto dum kvardek kvin jaroj, fondis lokan grupon en Kioto, en 1922 alprenis la laboron de Delegito de UEA, dum kaj antaŭ-militaj kaj postmilitaj periodoj li estis Ĉefdelegito por Japanujo. Li partoprenis kvin Universalajn Kongresojn kaj kvarfoje prelegis en la Internacia Somera Universitato. Li restas aktiva en la Japana movado kaj estas nun Prezidanto de la LKK por la Kongreso en Tokio en 1965.*

# DECIDA KONGRESO

## LA FESTPAROLADO

*Enkondukante sian temon, Prof. Lapenna unue priparolis la elekton de la kongreslando kaj de la kongresurbo. Li laŭdis la sintenon de la instancoj kaj de la gazetoj kaj aparte esprimis sian ŝaton por la subteno, al la kongreso kaj al la Esperanto movado, donita de la Ĉefministro de Danlando, S-ro Viggo Kampmann. Li ankaŭ dankis al la Ministro de Instruado, S-ro Helveg Peterson, kiu multe helpis al nia lingvo kaj kiu ĉeestis por saluti la Kongreson sianome kaj en la nomo de la Ĉefministro. "De post la Bulonja Kongreso," diris Prof. Lapenna, "tiu ĉi kongreso estas, aŭ almenaŭ povas fariĝi, la plej grava, eble la plej decida."*

*Sekvas, kun nur kelkaj ellasoj kaj mallongigoj la teksto de la daŭrigo de la festparolado :*

### La Akra Lingvo-Situacio en la Mondo

La lingvoproblemo en la mondo pliakriĝas ne plu de jardeko al jardeko, eble eĉ ne plu de jaro al jaro, sed de monato al monato kaj ĝi atingis tian gradon, ke radikala solvo tre baldaŭ devos esti trovita. Se vi malfermas ĉiutagan gazeton, vi vidas inter la informoj eĉ tragikajn sekvojn de la lingvodiverseco. Homoj faras memmortigojn, ĉar ili ne komprenas fremdajn lingvajn mediojn, aŭ ili ne povas komprenigi sin en tiaj medioj. Homoj dronas en la profundojn de la maro, ĉar la instrukcioj pri savado estis donitaj en nekonataj lingvoj. Aviadilaj akcidentoj okazas pro lingvaj miskomprenoj !

Flanke de tiuj tragikaj, feliĉe sporadaj akcidentoj, malpli tragikaj, malpli fatalaj, mi kuraĝus diri tragikekomikaj incidentoj okazas ĉiutage en internaciaj kongresoj kaj konferencoj, en diplomatiaj rilatoj, eĉ ĉe doganoj kiam oni eniras fremdajn landojn, ĉe ceremonioj okaze de internaciaj geedziĝoj, eĉ en kortumoj, kiam oni pritraktas juron de aliaj landoj, en plej diversaj okazoj.

Krom ĉiaj informoj, kiujn oni povas legi en gazetoj, ĉiam pli kaj pli en seriozaj revuoj, en studoj, en diskutoj, en universitatoj oni pritraktas la lingvan problemon. Sufiĉas ke mi memorigu vin, ke en la lastaj monatoj ŝtatestroj en pluraj okazoj, kiel ekzemple la franca prezidento De Gaulle, opiniis necesa mencii en tiu aŭ alia formo la Internacian Lingvon Esperanto. La konata lingvisto Mario Pei aperigis vicon da artikoloj pri lingvaj problemoj. La granda anglalingva revuo LIFE aperigis tutan serion da artikoloj, kiuj kompreneble pledis por la angla lingvo. En Parizo aperis libro en kiu, kompreneble, la aŭtoro pledis por la franca kiel sola internacia lingvo, kaj en Soveta Unio aperas multaj artikoloj, en kiuj oni akcentas la gravecon de la rusa lingvo kiel internacia lingvo en la internaciaj rilatoj. Ĉio ĉi manifestas la faktón, ke la lingva problemo akriĝas ĉiam pli kaj pli. Eĉ en Britujo, kies nacia lingvo estas nun plej multe uzata tra la mondo, la lingva problemo sentiĝas pli kaj pli. Brita parlamentano sinjoro Arthur Woodburn faris proponon pri kreo de nova komuna lingvo.

Ne gravas en tiu ĉi kunteksto, ke pritraktante la problemon, precipe kiam oni pledas por tiu aŭ alia nacia lingvo, oni misprezentas — ĉu konscie, ĉu nekonscie, ĉu pro ignorado, ĉu pro intenca falsado — la veron rilate Esperanton. Nia informa aparato sukcese kontraŭbatalas tiujn misprezentojn. Tio kio pleje gravas en tiu ĉi kunteksto estas, ke la lingva problemo objektive sentiĝas ĉiam pli kaj pli forte en ĉiuj internaciaj rilatoj de la homoj, ek de plej simplaj turismaj ĝis la rilatoj inter sciencistoj, politikistoj kaj diplomatoj. Tiu problemo ekzistas, tiu problemo akriĝas, tiu problemo bezonas solvon. La kelkaj ekzemploj, al kiuj ni aludis antaŭ kelkaj sekundoj, estas nur simptomoj pri la reala ekzisto de la problemo. Kaj ĉio ĉi puŝas la aferon sur nian vojon.

### Vanaj Provoj kaj Proponoj

Kial ? Estis diversaj provoj, diversaj proponoj faritaj sur tiu ĉi kampo. Vi ĉiuj scias, ke la konata franca-angla dulingvismo, kiu siatempe kreis multan interesiĝon kaj faris grandan bruon en la mondo, fakte bankrotis kaj ke oni ne plu parolas pri ĝi. Vi scias, ke alia projekto, kies protagonistoj pledis ke ĝi estas komprenebla sen lernado — kaj fakte ĝi estis komprenebla sen lernado por ili mem kaj ne por la aliaj — tute kompromitiĝis pro tiu blufo. Estis propono ke oni devus intensigi la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj, sed neniu diris kiamaniere oni povas ankoraŭ ŝarĝi la lernejajn programojn nun, kiam la lernantoj devas ĉiam pli okupiĝi pri sciencoj, pri la progresado de la tekniko. Kiamaniere oni enkondukos la lernadon de lingvoj kaj kio rezultus, se oni efektive povus enkonduki pliajn lingvojn? Kiujn lingvojn do oni devus hodiaŭ lerni ? Tri, kvar, kvin, ses lingvojn ? Kaj kiamaniere ni lernu tiujn lingvojn en la lernejoj, se la lernantoj devas studi cent aliajn aferojn ? Kiam oni rimarkis, ke ne estas eble enkonduki multajn lingvojn en la lernejojn, oni komencis pledi por unu sola nacia lingvo. Kompreneble kelkaj pledis por la angla, aliaj por la franca, triaj por la rusa kaj verŝajne en Azio oni pledas por la ĉina. Mi opinias, ke tiuj kiuj propagandas la ideon de unu sola nacia lingvo kiel internacia, mem ne multe kredas je la ebleco de realigo de tiu ideo. Hodiaŭ ekzistas multaj potencaj ŝtatoj kun grandaj kulturaj tradicioj, kiuj ne permesos, ke iliaj lingvoj — iliaj plej grandaj kulturaj trezoroj — estu flankenpuŝitaj de unu sola nacia lingvo.

Ĉiuj ĉi provoj kaj proponoj, kiuj interesas la publikon, sed tamen ne sukcesas konvinki, finfine helpas al klopodoj sur la vojo, kiu kondukas al la sola ebla, justa solvo, nome al la akcepto de la neŭtrala Internacia Lingvo.

### La Matureco de Esperanto

Ekestas nun demando, ĉu tiu Internacia Lingvo estas nun matura ludi la rolon, kiun laŭ nia opinio ĝi devus ludi.

Ni ĉiuj klare distingas inter projekto de komuna lingvo kaj vivanta lingvo. Ni scias, ke en la kultura historio de la homaro ekzistas pli ol mil projektoj de komuna lingvo, sed ni ankaŭ scias, ke nur unu el tiuj projektoj transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo, kaj tio estas la Internacia Lingvo Esperanto. *(Aplaŭdo)*

Hodiaŭ, geamikoj, precipe post kiam D-ro Zamenhof genie solvis la aferon, ĉiu persono kiu iom okupiĝis pri la problemo de internacia lingvo, povas krei novan projekton de komuna lingvo de hodiaŭ vespere ĝis morgaŭ matene. Alia afero estas transformi projekton en vivantan lingvon. Por tion atingi centoj kaj miloj da personoj devis labori : tiuj kiuj kreadis la Esperantan literaturon ĉu verkante originale en la Internacia Lingvo de Zamenhof, ĉu tradukante, ĉu eldonante gazetojn, ĉu verkante artikolojn aŭ sciencajn studojn, ĉu uzante la lingvon en ordinaraj konversacioj.

Paralele kun tiu utiligo de la Internacia Lingvo en literaturo, en la scienco, en la radio, por plej diversaj celoj, la lingvo mem interne evoluis kaj anstataŭ mil radikoj el la Unua Lernolibro ni havas hodiaŭ ĉirkaŭ dek mil radikojn en la ĝenerala vortaro, el kiuj ni povas fari cent mil aŭ pli da vortoj.

Ni do scias, ke tiu nia lingvo estas kapabla ludi la rolon, kiun ni celas, sed en la ekstera mondo ankoraŭ ekzistas duboj. Ne eble duboj pri la funkciado mem de Esperanto, ĉar finfine niaj kongresoj ne estas iaj sekretaj kunvenoj kaj ĉiu povas mem konstati tion. Ni havas la okazon saluti en niaj Kongresoj reprezentantojn de diversaj ŝtatoj kaj mi esperas ke ili raportos al siaj registaroj pri la funkciado de tiu nia lingvo. Ni scias, ke la fama franca lingvisto Meillet diris : "Ni ne povas nei la fakton, ke Esperanto funkcias."

Duboj tamen ekzistas ankoraŭ rilate du punktojn. La unua estas : Ĉu Esperanto estas konvena kiel arta esprimilo ? kaj la dua : Ĉu ĝi taŭgas kiel scienca lingvo ? Kompreneble, ni mem scias, ke ĝi taŭgas. Tamen ni volis doni pliajn pruvojn pri la Internacia Lingvo kiel arta esprimilo. Tial ni organizis en la pasinta jaro en Harrogate la Unuan Artan Festivalon, kiu, precipe dank' al nia brila, sindona Internacia Arta Teatro, tre bone sukcesis. Ni havos en Sofio la Duan Internacian Artan Festivalon, kaj mi ne dubas, ke ĝi estos same aŭ eĉ pli sukcesa.

Por montri la taŭgecon de la Internacia Lingvo por sciencaj celoj ni havas en tiu ĉi kongreso, kiel akcentis D-ro Neergaard en la komenco, la Unuan Konferencon pri la Lingva Problemo en la Scienco. Mi povas al vi diri, ke sesdeko da partoprenantoj kaj observantoj anoncis sin por la Konferenco kaj 25 elstaraj kontribuoj pri la lingva problemo en diversaj branĉoj de la scienco kaj pri la eblaj solvoj estas faritaj, kaj ili estos legitaj en la Konferenco. Mi estas tute certa, ke la rezultoj de tiu ĉi konferenco estos plia kontribuo al fortikigo de Esperanto en la scienco kaj helpo por akiro de novaj pozicioj. Mi opinias, ke kondiĉe ke ni gardu kaj konservu la lingvan unuecon kiel garantion por la estonteco, la Internacia Lingvo Esperanto plene taŭgas por kontentigi la bezonojn de internacia komunikado en la nunaj kondiĉoj. *(Aplaudo)*

## La Rolo de la Movado

Do, vi pensas, la afero estas simpla. Unuflanke akriĝas la lingva problemo, tiu akriĝo postulas solvon. Aliflanke ekzistas la Internacia Lingvo, kiu prezentas tiun solvon. Sekve, kio pli simpla ol preni tiun lingvon kaj utiligi ĝin por kontentigi la bezonojn ?

La afero tamen ne estas tiel simpla. Se ni estas en iu loko, ni diru en iu fermita domo, kaj ni estas tre malsataj kaj en tiu domo troviĝas manĝaĵoj, eĉ tre bongustaj, eble en fridujo bone konservitaj, sed ni ne scias, ke tiuj manĝaĵoj troviĝas tie, ni restos malsataj kaj eble, malfeliĉe, eĉ mortos pro malsato. Devas esti io kio kunligas la bezonon al la rimedo kaj tiu "io" en nia kazo estas niaj organizaĵoj sur tri niveloj : la regiona, reprezentita de la lokaj grupoj — la landa, reprezentita de la landaj asocioj — la monda, reprezentita de Universala Esperanto-Asocio kaj de ĉiuj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj. La tasko de tiu nia organiza aparato estas diskonigi la Internacian Lingvon per korekta kaj objektiva informado, instruadi la lingvon kaj instruigi ĝin en la lernejoj, kaj ebligi ĝiajn kiel eble plej vastajn kaj profundajn aplikojn.

Nur antaŭ ses jaroj, en tiu ĉi sama urbo, ni kompletigis la Unuan Laborplanon de U.E.A., kiun ni estis akceptintaj en Bologno. Pri la rezultoj de nia agado surbaze de tiu laborplano vi havis la okazon legi en la Estraraj Raportoj de la pasintaj jaroj kaj vi havas ankaŭ la okazon legi en la Raporto por tiu ĉi jaro.

Kun granda plezuro mi anoncas al vi, ke la Unua Laborplano de U.E.A. estas praktike realigita kaj ke nun estas necese akcepti la Duan Laborplanon de la Asocio por la agado en la estonteco. Mi tamen ne povas ne mencii ĉi tie kelkajn faktojn, kiuj sendube ĝojigos vin, kiujn kelkaj eble jam scias, sed multaj verŝajne ne konas.



*Atenta aŭdantaro dum la Solena Inaŭguro*

## Jubileaj Sukcesoj

La unua fakto estas, ke en tiu ĉi jubilea jaro — ĉar ni festas 75 jarojn de la ekzistado de Esperanto kaj ni ankaŭ festas la plenumon de nia unua plano — ke, do, en tiu ĉi jubilea jaro denove kreskis la membronombro de U.E.A., ĉar la pasintan jaron ni finis kun 31.000 membroj. La dua fakto estas, ke, kvankam ni devis plialtigi la kotizon, tamen la membraro restis fidela kaj rezulte ni finis la pasintan jaron sen deficito. Ek de kiam fondiĝis U.E.A. en la jaro 1908, tio estas la dua fojo ke U.E.A. finas sian jaron sen deficito. Ambaŭ tiuj jaroj estis en tiu ĉi lasta sesjara periodo. (*Aplaŭdo*) La tria fakto kiun mi deziras mencii estas, ke la lerneja kampanjo, kiun ni iniciatis tuj post la Zamenhof-jaro, donis relative kontentigajn rezultojn. Hodiaŭ vi aŭdis kelkajn el tiuj rezultoj. Mi povas aldoni, ke en la lasta lerneja jaro Esperanto estis instruata en proksimume 500 lernejoj de 27 landoj. Tio estas nemulte, se ni komparas kun la instruado de la naciaj lingvoj en lernejoj de la tuta mondo, sed tio estas multe se ni pensas, ke nur antaŭ kelkaj jaroj Esperanto ne estis instruata en pli ol 150 aŭ 200 lernejoj, kaj se ni komparas la atingitajn rezultojn en la instruado mem kun la rezultoj, kiujn oni atingas en instruado de naciaj fremdaj lingvoj.

El vidpunkto de la pozicio de U.E.A. en la ekstera mondo la situacio pliboniĝis, ĉar la Asocio ricevis la konsultajn rilatojn B kun UNESKO, kaj tio estas la plej multo, kiun organizaĵo kiel la nia povas ricevi en la rilatado kun la monda institucio por edukado, scienco kaj kulturo. Kun plezuro mi komunikas, ke rezulte de nia efika kunlaborado kun UNESKO la Sekretariato de UNESKO decidis eldoni plian broŝuron en la Internacia Lingvo Esperanto. (*Aplaŭdo*) Fine, denove el ekstera vidpunkto, ne nur en la jaro 1961, sed ankaŭ en 1962, granda nombro da alte kvalifikitaj personoj, kiuj rajtas fari tian proponon, kandidatigis U.E.A. por la Nobel-Pacpremio. (*Aplaŭdo*)

Antaŭ nelonge la estraro de U.E.A. sendis alvokon al ĉiuj individuaj membroj atentigante pri la plano vastigi la aktivecojn. La laboro de sinjoro Tibor Sekelj kaj la Karavano de Amikeco en Afriko, la laboro de sinjorino Haudebine en Hindujo, tiu de sinjoro Sadler en Cejlono kaj de multaj aliaj personoj en diversaj partoj de la mondo, ĉio ĉi en ligo kun la projekto de la nova Laborplano, necesigas la vastigon de la agado en la historiaj kondiĉoj, kiujn mi prezentis al vi. La rezulto de nur kelkmonata kolektado estas, ke amaso da membroj sendis siajn kontribuojn. Vi povis legi en la julia-aŭgusta numero de ESPERANTO tutan paĝon da nomoj de personoj, kiuj kontribuis por tiu celo, kaj vi povos legi en la septembra kaj oktobra numeroj plurajn pliajn paĝojn, *en pluralo,* da nomoj de kontribuintoj. Ĝis nun estas kolektitaj ĉirkaŭ naŭ mil guldenoj por la speciala celo vastigi la agadon de U.E.A.

Fine mi ne povas ne diri ĉi tie, ke la vidvino de Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio, la homo kiu sian tutan vivon dediĉis al la laboro por Esperanto kaj al la progresigo de la Asocio, kvankam tre maljuna, pli ol 80-jara, havis la plej bonan intencon partopreni en tiu ĉi Kongreso por sperti la plezuron : vidi mem la progreson de Esperanto kaj de Universala Esperanto-Asocio, la infano por tiel diri, de sia edzo. Bedaŭrinde pro la alta aĝo kaj pro la ne tre bona farto, ŝi ne povis veni, sed ŝi sendis siajn salutojn, bondezirojn kaj, krome, donacis mil svisajn frankojn por plia vastigo de la agado, precipe inter la junularo. (*Aplaŭdo*) Mi proponas, ke tiu ĉi kongreso sendu al sinjorino Hodler, varman, koran telegramon kun bondeziroj kaj tutkora danko de la Universala Esperanto-Asocio. (*Longdaŭra aplaŭdo*).

## Unika Historia Periodo

Karaj geamikoj, finiĝas la trijara periodo de la Estraro, finiĝas la sesjara periodo de la Unua Laborplano. Mi opinias, ke ni povas esti feliĉaj, ke U.E.A. en tiu decida momento estas pli forta ol iam ajn antaŭe, kun sanaj financoj, kun fortika bazo, kun granda domo en Rotterdam, grava havenurbo de Eŭropo, kun taŭgaj oficistoj, kun bona informa aparato, kun bonaj perspektivoj en la lerneja kampanjo, kun prestiĝa pozicio en la rilatoj kun UNESKO. De ni, nur de ni, de niaj organizaĵoj, de la gvidantoj de niaj organizaĵoj, dependos ĉu ni scios utiligi tiun unikan historian periodon aŭ ne. Mi diras "unika", ĉar la historio, malgraŭ la opinio de kelkaj historiistoj, ne kutimas ripetiĝi, kaj tutcerte ĝi ne ripetiĝos sur tiu ĉi kampo, nome sur la lingva kampo. Vi aŭdis kion diris hodiaŭ matene unu reprezentanto, nome la esperantista reprezentanto de Usono, kaj mi ĝojas, ke precize la reprezentanto de tiu granda kaj potenca ŝtato diris tion : estas nur du eblecoj por solvi la brulantan lingvan problemon, nome aŭ unu nacia lingvo, eble la angla, aŭ la Internacia Lingvo. La akcepto de unu lingvo signifus utilon por unuj tute egale kiu estos tiu lingvo — kaj grandajn malavantaĝojn spiritajn, kulturajn, intelektajn kaj moralajn por ĉiuj aliaj. La dua solvo donos avantaĝon al ĉiuj kaj tiun solvon reprezentas la Internacia Lingvo Esperanto. (*Aplaŭdego*) Sed niaj organizaĵoj devas esti kapablaj vidi la esencon de la problemo, vidi la grandecon de Esperanto por povi altrudi ĝin al la homaro. Ne altrudi perforte kaj diktatore, sed altrudi en la intereso de la tuta homaro per konvinkaj argumentoj kaj persvado. (*aplaŭdo*).

Mi estas certa, ke la momento estas matura por tio kaj mi estas ankaŭ certa, ke la Internacia Lingvo estas matura por kontentigi la bezonojn. Necesas nur, ke ni ĉiuj agu unuece : unuece ne nur el lingva vidpunkto, ne nur el organiza vidpunkto, sed ankaŭ el vidpunkto de la celoj. Necesas, ke ni ne perdu nian tempon por malgravaĵoj kaj akcesoraĵoj, sed ke ni centrigu nian tutan atenton al la esenca afero. *Kaj la esenca afero estas, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas komunan lingvon, ke sekve devas esti trovita kaj tre verŝajne estos trovita solvo jam en tiu ĉi generacio kaj ke ni estas kapablaj doni al la homaro la belan, klaran, logikan, evoluintan Zamenhofan Internacian Lingvon. (Tondra aplaŭdo)*

## La Nova Laborplano

Supozante, geamikoj, ke estos tiel, la Estraro de U.E.A. ellaboris la projekton de la nova Laborplano de U.E.A Ĝi ne estas ordono. Ĝi estas nur bazo de nia komuna agado. Ĝi formas larĝan kadron kun multaj eroj. Se ni sukcesos realigi ilin, ni plenumos nian taskon. Tial estas necese, ke morgaŭ la Ĝenerala Kunveno — kaj poste la Komitatanoj en la Komitato — dediĉu sian plenan atenton al la Laborplano. Ni diskutu ĝin vaste, ni faru aldonojn, ni metu en ĝin freŝajn ideojn, ni faru ŝanĝojn, ni forstreku, kio ne plaĉas al ni, sed kiam ni foje akceptos ĝin, geamikoj, ni devas realigi ĝin per komunaj fortoj ! Se ni ne faros tion, ni ne sukcesos, kaj nia tuta laboro estos vana. Sed se ni atingos tion, ke ni povos agi per komunaj fortoj surbaze de komune ellaborita laborplano, al kiu ni ĉiuj povas kaj devas kontribui, mi garantias, ke ni atingos multajn novajn sukcesojn, kaj eble ni atingos eĉ la finan venkon jam en tiu ĉi generacio. Kun tiu espero, ke ni harmonie, amike kunlaboros en tiu ĉi kongreso kaj kreos bazon por nia estonta laboro, mi bondeziras al vi ĉiuj : Antaŭen por la bono de Esperanto ! Antaŭen por la bono de la tuta homaro ! (*Longdaŭra aplaŭdo*)

# LA SOLENA INAŬGURO

La Solena Inaŭguro de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto okazis je la naŭa kaj tridek, dimanĉon la 5-an de aŭgusto, 1962, en Tivoli, Kopenhago. "La ĉiujara miraklo" diris la Kongresprezidanto, *S-ro H. W. Holmes* kiu oficiale malfermis la Kongreson. Sekvis vere sorĉaj horoj. Sorĉaj pro la ripetita miraklo de perfekta interkompreniĝo, pro la homarana sento, pro la mensa kunfandiĝo de ĉiuj en la vasta digna solono. Spicis niajn sentojn la konscio, ke ĉeestas anoj de 36 nacioj el la 5 kontinentoj, kaj la fakto, ke nur ni, pere de Esperanto, povas okazigi tian senmiskomprenan manifestacion.

Jes, vere, la programo estas simila ĉiujare. Tamen, malgraŭ tio, estas ĉiam io nova, kaj ĉiam la plej cinikajn, la plej enuiĝemajn, la plej lacajn la Inaŭguro reinspiras kaj levas al montpinta entuziasmo.

Bonvenigas *D-ro Paul Neergaard,* la prezidanto de la laboreginta LKK, kiu materie ebligis ĉi tiun spiritan okazaĵon. Post respondo de *S-ro Holmes* sekvas la salutoj. En la nomo de la dana ĉefministro, *S-ro Viggo Kampmann,* Honora Protektanto de la Kongreso, kaj egale en sia propra nomo, salutas *S-ro K. Helveg Peterson,* Ministro pri Instruado. Li deziras al la Kongreso bonan veteron kaj belajn memorojn pri Danlando, sukceson en la disvastigo de Esperanto, kaj la ĝojon apliki Esperanton al paca kunlaboro kaj al la mildigo de internaciaj streĉiĝoj laŭ la volo de la granda plimulto de ĉiuj teranoj. *Prof. D-ro Hideo Yagi* respondas.

Bela muziko pluen altigas niajn sentojn.

Salutas reprezentantoj de 10 registaroj — *Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Finnlando, Germanujo, Italujo, Madagaskaro, Nederlando, Norvegujo, Novzelando.* Kvar el la dek salutintoj estas senditoj de la *Aŭstra, Brazila, Itala* kaj *Germana* Ambasadejoj en Kopenhago.

Grava saluto venis de *S-ro Perrot,* oficiala observanto de la *Internacia Federacio de Instruistaj Asocioj,* (angle IFTA). Dum sia kongreso lastatempa en Stokholmo, tiu Federacio konstatis la urĝecon de la lingva problemo kaj decidis esplori la aplikon de Esperanto por la propraj celoj.

Aplaŭdon vekas la senditaj salutoj. Inter aliaj telegramo de *S-ro E. Malmgren* kaj letero de *S-ino Haudebine.*

Nun sekvas la landaj asocioj. Unu minuto estas malmulto por esprimi sin al 1500 atentaj aŭskultantoj. Tamen sen troa ripetado, sen banaleco, la salutantoj sukcesas. Sinsekve ili venadas sur la scenejon; parado de la homaro; — *Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo,* — *Britujo, Bulgarujo* (1800 ĉe lasta enlanda kongreso), — *Danlando, Finnlando, Francujo* (60 lernejoj nun instruas Esperanton !) — *Germanujo, Grekujo, Hispanujo,* — *Hungarujo, Israelo, Italujo,* — (de ĉiuj la sama lingvo, kun agrablaj nuancoj de elparolo), — *Japanujo, Jugoslavujo, Madagaskaro* (okulfrapa kostumo), — *Nederlando, Norvegujo, Novzelando* (jen la kvina kontinento) — *Pollando, Svedujo, Svislando* — *Usono.* — *Ĉeĥoslovakujo, Etiopio* (kia digno, kia pura lingvo) — *Hindujo, Islando, Libano* (nove aliĝinta lando — la sepa saluto de ekster Eŭropo).

La aŭdantaro ĝoje aŭdas salutojn el *Moskvo* pere de *Prof. D-ro Hideo Yagi.* Ili aplaŭdas kaj mansvingas al la membroj de la Infankongreseto, kiuj sin montras sur la balkono.

Muziko denove ĉarmas la orelojn kaj pretigas la spiritojn por la ĉiujara klimakso — la festparolado.

Plena raporto de la festparolado troviĝas aliloke. Stagna inko sur papero tamen tute ne povas redoni la vervon de la senpera aŭdado. Se la leganto jam aŭdis *Profesoron Lapenna,* sufiĉas diri ke li superis sin mem. Se ne, mi povas nur raporti, ke, aŭdinte la paroladon, oni dubas, ne pri la perfekta taŭgeco de Esperanto por oratorado, sed pri la taŭgeco de ĉiuj aliaj lingvoj.

Longa ovacio de la ekstarinta publiko tondris je la konkludo de la parolado kaj ankoraŭ inspirite la kongresanoj kantis "La Esperon".



*La Ministro pri Instruado, S-ro K. Helveg Peterson, salutas la Kongreson; S-ro Sv. Ziegler interpretas.*



*Dum la Solena Inaŭguro; kelkaj salutantoj de diversaj landaj asocioj sidas kune.*

# LA DU KONGRESOJ

Universala Kongreso estas vere du kongresoj en kombino.

Unuflanke estas la manifestacio, la arto, la ĝuo, la kulturo, la ekskursoj, la distraĵoj kaj la klerigaj prelegoj de ISU; kiujn partoprenas la kongresa publiko. Aliflanke por estraranoj aŭ komitatanoj la reprezentantoj de la movado el ĉiuj mondpartoj, la Kongreso estas seninterrompa sinsekvo de kunsidoj, komisionoj, subkomitatoj, studrondoj kaj raportverkado.

Por la publiko la Kongreso restas ĉiujara festo, demonstracio de la Internacia Lingvo. Pli kaj pli ĝi fariĝas ankaŭ la okazo kiam la movado kolektas siajn fortojn, planas por la estonteco kaj decidas pri celoj kaj rimedoj.

Estas vere, ke la du kongresoj konstante tuŝas unu la alian. Komitatano trovas momenton por saluti amikojn; la Estraro, ĵus lasinte kunsidon, lastmomente venas en la teatron; kongresanoj aŭskultas al la kunsidoj de la Komitato; foje iu kongresano helpas per raporto por la gazetara servo aŭ, en fakkunveno, efike kontribuas al la laboroj de la Kongreso. En la Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA ĉiuj kune partoprenas la laboron.

Efektive, tamen, la Kongreso havas klaran duoblan naturon kaj por tion emfazi la sekvantaj raportoj alterne tuŝas unu aŭ alian aspekton.

# LA ĜENERALAJ KUNVENOJ DE U.E.A.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO havis la temon : - *La rolo de la lokaj grupoj en la nova laborplano de UEA.*

Sub la prezido de S-ro H. W. Holmes pli ol 500 personoj kunvenis. Unue Prof. Lapenna enkondukis la diskuton tre koncize. Li supozis, ke ĉiuj jam legis la projekton de laborplano kaj evidentiĝis, ke ne nur tio estas vera, sed ke landaj asocioj, lokaj grupoj kaj ĉiaspecaj organizaĵoj jam detale diskutis la planon.

Komisiono de la Komitato de UEA, starigita por studi la laborplanon, petis de la kunsido komenton pri la demando : - *Ĉu la laborplano entute enhavu punktojn rilatajn al la landaj asocioj kaj lokaj grupoj?* Energiaj jesoj venis de 11 personoj, kiuj parolis en la nomoj de landaj asocioj aŭ grupoj diskutintaj la planon. Tiel emfaze estis esprimita la opinio, ke tiaj punktoj estas ne nur dezirindaj sed eĉ esencaj el vidpunkto de la landaj kaj lokaj organizaĵoj ke, post malpli ol duonhora diskuto la prezidanto voĉdonigis la ĉeestantojn. Sep ne voĉdonis, du kontraŭis, ĉiuj aliaj deziris la inkluzivon de landaj asocioj kaj lokaj grupoj en la laborplano. La prezidanto klarigis, ke, kvankam tia voĉdono ne estas decidpova, ĝi donos utilan indikon al la Komitato dum ĝiaj diskutoj.

Interesa punkto en la diskuto estis aludo de S-ro Oljanov el Bulgarujo, pri malaproba cirkulero el Britujo, prikomentanta la devigan naturon de la projekto de laborplano. Anstataŭ protesti pri tio la Bulgara Esperantista Asocio male bonvenigas tiun econ de la plano kaj sin devigos, laŭeble sekvi la laborplanon ellaborotan de la tutmonda organizaĵo. S-ro J. Wells, komitatano A de Britujo, deklaris, ke tiu cirkulero venis persone de la honorofica sekretario de la enlanda asocio sen antaŭa diskuto en ĉi ties konsilantaro.

La kunsido nun turnis sin al punktoj 13 kaj 26 de la projektita laborplano. Reprezentantoj de pluraj lokaj grupoj raportis pri diskutoj okazintaj dum siaj kunvenoj. La ĝenerala etoso estis aproba al la plano kaj la kontribuoj ĉefe konsistis el sugestoj pri aldonaj punktoj kaj pri rimedoj por plej efike plenumi la planon. S-ro Bertoletti el Italujo prezentis zorge ellaboritan dokumenton pri gruplaboro. Valoraj sugestoj venis de pluraj personoj inkluzive S-rojn Strönne kaj Olsson el Svedujo, S-ron Minnaja el Italujo, S-ron Uspienski el Pollando, S-ron Breitenbach el Germanujo kaj S-ron Ockey el Britujo. Aliaj raportoj venis el Brazilo, Japanujo, Portugalujo kaj Hindujo. D-ro Lapenna skizis la siaopinie modelan agadon de la iama Akademia Klubo en Zagreb. Pluraj parolantoj emfazis, ke oni uzadu la lingvon en grupkunvenoj kaj S-ino Korytowska prezentis solvon por malgrandaj grupoj kun multaj komencantoj dividantan la kunvenon en lecionan kaj pure Esperantan partojn.

La tuto de ĉi tiu parto de la kunveno formas bazon por eventuala altkvalita dokumentaro pri grupagado.

Interesa punkto por la atento kaj de la Estraro de UEA kaj de la instancoj de pli fortaj landaj asocioj estis la pledoj de Portugalujo kaj de S-ro Mahant el Hindujo por helpo al relative malfortaj landaj movadoj.

La kunveno lasis tre kontentigan impreson pri unueco de ideoj, volo al kunlaboro kaj pozitiva energio flanke de ĉiuj ĉeestantoj.



*Dum la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA pli ol 500 laboremuloj pripensas la Duan Bazan Laborplanon.*

LA DUA ĜENERALA KUNVENO havis la tagordon : -
*1. La Estrara Raporto*
*2. Dumkongresaj laboroj de fakaj kaj aliaj organizaĵoj*

Prezidis S-ro Norman R. Smith kaj partoprenis pli ol 200 personoj el kiuj proksimume 50 staris trà la pli ol duhora kunsido. Evidente la organizintoj subtaksis la laboremon de la kongresanoj.

Unue Prof. Lapenna resume prezentis la Estraran Raporton por 1961-2 jam aprobitan de la Komitato. Ĉar la nova Estraro estis jam elektita, li ankaŭ kompletigis la raporton per kelkaj elstaraj eventoj okazintaj inter aprilo kaj la Kongreso. (Vidu raporton pri la laboro de la Estraro kaj Komitato). La ĉeestantaro evidente estis kontenta pri la raporto kaj okazis malmulta diskuto aŭ komento. La ĉefa punkto estis la grava rolo de la individua Esperantisto por sukcesigi radioelsendojn en Esperanto, ĉu per skribado al stacioj kiuj jam dissendas, ĉu petanta al aliaj enkonduki Esperanton. La aŭdantaro esprimis sian dankon al Prof. Lapenna pro la interesa kaj klara trarigardo.

Grava punkto en la raporto, sed ĉi tie apartigita pro emfazo, estis la danĝero de granda deficito de la 47-a Kongreso, peza ŝarĝo je la LKK kiu jam tiel bone laboris. El tuja monkolekto alvenis pli ol 1800 danaj kronoj, pro kio S-ro Smith sincere dankis la ĉeestantojn.

En la dua punkto de la tagordo oni aŭdis raporton de D-ro Neergaard pri la *Scienca Konferenco* kaj raportojn de la jenaj organizaĵoj : -

*Studenta Tutmonda Esperantista Ligo*
*Universala Medicina Esperanto-Asocio*
*Esperanta Ŝak-Ligo Internacia*
*Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*
*Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj-Esperantistoj*
*Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj*
*Internacia Scienca Asocio Esperantista*
*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*

Raportoj pri ĉi tiuj kaj aliaj fakaj organizaĵoj aperas aliloke. S-ro Rentmeister transdonis saluton de la Kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda.*

La raportintoj ĝenerale montris sukcesajn laborojn dum la Kongreso kaj firman volon kun zorga planado por la estonteco de ĉiuj fakaj aŭ specialaj asocioj. Malpeza momento sekvis kiam S-ro Smith klarigis, ke la nudismo ne estas fako sed aparta intereso kaj anoncis kontrakto de kunlaboro inter UEA kaj *Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista.*

Fermante la kunsidon la prezidanto emfazis la gravecon de faka laboro kaj alvokis ĉiujn fakulon fariĝi fakdelegito de UEA, kaj subteni aŭ fondi sian propran fakasocion. Aparte laŭdinda estas la agado de la medicinistoj, arkitektoj kaj juristoj kiuj kontaktiĝis kun ne-Esperantistaj samfakuloj dum la Kongreso.

## ĜENERALA KOMENTO

Pri ambaŭ laborkunsidoj de UEA kaj multaj aliaj kunvenoj la raportanto devas esprimi sian ŝaton por la sinteno de la kongresanoj, kiuj kviete kaj atente sekvis la diskutojn. La parolantoj sin tenis al la temo kaj obeis la instrukciojn de la prezidantoj, tiel faciligante la laboron de la tuta Kongreso kaj aldonante al la plezuro de la aŭdantaro. Nur en la Internacia Somera Universitato kelkaj kongresanoj ankoraŭ ne venkis la emon alveni malfrue aŭ brue foriri antaŭ la finiĝo.

## LA KONGRESA LIBRO

La Kongresa Libro, kun 104 paĝoj precize samampleksa kiel la lastjara, elsaltas el la longa vico de kongreslibroj pro sia bela ekstera aspekto. En nordmara verdo ĝi montras la konatan statueton de la marvirineto je fono de akvo kaj kelkaj ŝipoj.

La enhavo, la kutimaj informoj, diversaj artikoloj, estas kontentiga malgraŭ kelkaj evitindaj mankoj. La adresaro, inkluzive tiun en la Suplemento, estas tre kompleta. Mankas nur la lastaj sesdek aliĝintoj. Preseraroj estas malmultaj.



*La Bankedo*

# TEATRAJ EVENTOJ

## ONKLO MAROJE

Lundon, la 6-an de aŭgusto, dum la oficiala Teatra Vespero, la kongresanoj rajtis senpage partopreni unikan, tre gravan okazon. Helpite per subvencioj de la Konsilantaro por Kulturo de la Kroata Popola Respubliko kaj de Universala Esperanto-Asocio, la Internacia Arta Teatro prezentis ”Onklo Maroje”; renesanca farso de la fama Jugoslava verkisto, Marin Držić. La intrigo kaj kvalito de la verko memorigas pri Molière. Prezento okazis en 1551, do la verko signas gravan stadion en la historio de la dramo. Tamen pro la lingvo de la originalo ĉi tiu teatraĵo estas preskaŭ nekonata ekster Jugoslavujo. La IAT do donis al la Esperantista publiko pluan okazon sin klerigi kaj aldonis pluan gravan eron al la Esperanta mondkulturo.

Mi ne penos resumi la intrigon aŭ priskribi la rolojn, nur esperas, ke iam oni havos la okazon legi la tekston. La prezento estis virtuoza kaj la aktora tekniko kontentigis malfacilajn postulojn. Dum la ludado Mladen Šerment (onklo Maroje), Ljubica Joviĉ (Petrunjela) kaj Vlado Kovaĉiĉ (Bokĉilo) tiel verve aktoris, ke ili ŝajne paligis la aliajn. Nur poste mi konstatis, ke ĉiu rolo estis zorge polurita kaj kontribuis al la tuta efekto. Sendube la plej grandan meriton oni devas aljuĝi al Srdjan Flego, kiu ne nur enscenigis kaj reĝisoris (kial ”reĝio”?) sed ankaŭ tradukis la tekston kaj iniciatis la tutan aferon.

La nivelo de la tuto estas komparebla kun tiu de bonaj naciaj teatroj; sendube la Esperantistoj devos pli alte taksi sian bonŝancon povi vidi la IAT kaj ankaŭ devos pli forte subteni ĝin. Se sube sekvas kelkaj kritikaj komentoj tio ne estas pro malŝato, sed pro firma kredo ke la IAT estas sufiĉe matura por profiti per ili.

Sekvante la originalan tekston, la tradukinto provizis ion aŭtentikan sed iom longan por la gusto de moderna aŭdantaro. Supozeble por pli konversaciigi la stilon, la teksto enhavis plurajn lingvajn nekutimaĵojn kiuj multe pliigis la atentostreĉon postulatan. (Ekz. ”Vidis, vidis !” anstataŭ simpla kaj natura ”Mi ja vidis !”) Alia ĝeno por mi estis, ke dum pluraj gravaj paroloj la aktoroj plene montris siajn dorsojn. Ĉio ĉi, kune kun la (por moderna publiko) iom kliŝa rakonto kaŭzis treniĝon kiu bedaŭrinde reduktis la sukceson meritatan.



*Bela nacia kostumo.*

## LA LIBERVOLA TEATRO

Merkredon, vespere, kontraŭ sumeto de dek danaj kronoj, la kongresanaro havis la okazon vidi du gravajn, unuarangajn, modernajn teatraĵojn elfrancigitajn de Roger Bernard. Ambaŭ estis montritaj en Harrogate sed la ripeto estis absolute prava. La havebla publiko estis grandparte nova kaj por tiuj kiuj jam vidis la prezentojn la okazo vidi ilin duafoje estis alsopirata. Tiaj verkoj toleras vidon, revidon, studon, pripenson kaj ankoraŭ revidon.

Unue ni vidis ”La Homa Voĉo” de Jean Cocteau. Sola sur la scenejo, Jana Ravŝelj, en la rolo de forlasita amatino, per telefonado kiun ni aŭdas nur de unu fino, grade devigas ĉiun aŭdanton partopreni ŝian historion kaj ŝian tragedion. Se iam eblas, ke viro eniru la spiriton, la emociojn, la sentojn de virino, tio okazis dum ĉi tiu sceno. La lingvo tiel fluis, ke oni eĉ ne rimarkis ĝin; entute oni forgesis, ke temas pri aktorado. Kiam la kurteno falis la animo alsopiris ”Revenu, mi volas koni vin pli bone, mi volas vin konsoli”.

Egale sukcesa estis la dua teatraĵo, ”La Respektema P....” de Jean-Paul Sartre. La prezentado estis ĉiel laŭdinda : ĉiuj geaktoroj profunde eniris siajn rolojn; la lingvo glate fluis; la agado eĉ ne por unu momento stagnis; la roluloj estis simpatiaj; la situacio venis al ekscita klimakso. Laŭdinte ĉion mi ne povas ne aparte laŭdi Eta Bartolazzi en la malfacila titola rolo.

Des pli sukcesis ĉi tiu dramo, pro tio ke ĝi estas ne nur enscenejigo de homaj interrilatoj sed ankaŭ teatra eseo tuŝanta tri modernajn sociajn problemojn. Tiel la prezento vekas diskuton kaj pensadon, tiel la publiko poste priparolos kaj memoros. La tri problemoj estas rasa toleremo, la misuzo de mono aŭ politika potenco por privataj celoj kaj la plenumo de sana seksa vivo en modernaj kondiĉoj. Kvankam ĉi tiu rakonto lokiĝas en Usono, la problemoj havas mondvastan aplikon kaj estas ĝuste tiaj, kiaj interesas Esperantistojn. Ne nur temas pri tio, ke per tia teatraĵo la IAT pli interesos kaj pli plaĉos al sia publiko, sed, ke estas efektive devo de la moderna teatro, ĉu nacia, ĉu internacia, aliri tiajn demandojn.

Por la Libervola Teatra Vespero, dankon al IAT. Se la leganto sin demandas, ĉu iri al la venonta kongreso en Sofio, ĉu ne, la eblo vidi ion ĉi tian, ĉi tiel prezentitan devus esti decidiga.



*Dum la Bankedo; nomoj de maldekstre; Prof. Hideo Yagi, S-ino Kirsten Zacho, Prof. Ivo Lapenna, S-ino P. Neergaard, D-ro Paul Neergaard, S-ro Norman R. Smith, S-ro H. Olsen, S-ino K. Olsen.*

## LA DISTRA VESPERO

Vendredon vespere, post plena semajno de laboro aŭ amuzado, oni volas vidi ion malpezan, gajan kaj bonhumoran. Precize tion provizis ĉi tiu varietea programo planita kaj kompetente aranĝita de la LKK-ano, S-ro Erik Kirschner, kiu meritis kaj ricevis entuziasman aplaŭdon.

Plej eminenta inter la rolantoj estis Elsa Marianne von Rosen, unua dancistino de la Reĝa Opero kaj Baledo de Stokholmo, Gvidanto kaj Koreografo de la Skandinava Baledo. En la klasika stilo ŝi delikate flosis tra valso de Chopin, ludita de S-ro Jacob Valentin. S-ro Valentin ankaŭ akompanis S-ron Wandy Tworek kaj bele solludis Liebestraum (Amrevo) de Liszt. Infana akordeon-orkestro malfermis la programon kaj sekvis ilin Peter Nielsen (dana akordeonĉampiono) kaj Peter Anders, kiuj ludis popularan klasikan muzikon sur akordeonoj. La plej arta ero estis la Dana Junular-Ensemblo, kiu perfekte ĥorkantis kantojn en pluraj lingvoj, inkluzive Esperanton, kaj intermiksis la kantojn kun popoldancoj prezentitaj verve kaj precize. La plej grandan aplaŭdon gajnis la lasta prezento de S-ro Wandy Tworek, kiu, kaj serioze ludante kaj lude ŝercante, faris miraklojn per la violono.

La plej granda ĝuo de la vespero tamen venis de la Prezentisto, S-ro Roger Bernard, kiu sprite enkondukis la erojn, kaj de la "Maneken-Parado, Antaŭkurtena Intermezo" de Marjorie Boulton. En tio Srdjan Flego modiste reklamis porkongresajn vest-stilojn en kiuj pozis kaj pantomimis aktorinoj de la IAT. La ŝercoj de Roger Bernard kaj la satira teksto de Marjorie Boulton montris la elastecon de la lingvo kaj lerte primokis apartaĵojn de nia movado.

## LA PUBLIKO

Prave la publiko kaj la recenzistoj kritikas ion kio ne plaĉas al ili. Nur juste estas registri ankaŭ kelkajn kritikojn de la geaktoroj por la publiko. Ne ĉiujn mi povas senkomente akcepti sed tamen estas bone malkaŝe priparoli kelkajn aferojn. Unu afero estas, ke la publiko tre malbone subtenis la Libervolan Teatran Vesperon (venis nur 250), ĉu pro la Junula Vespero (ni devus eviti tiajn koincidojn), ĉu pro manko de dek kronoj (la kosto de modesta manĝo), ĉu pro nesufiĉa reklamo, ĉu pro malkontento pri la pli frua oficiala prezento de "Onklo Maroje". Iuokaze pli ol mil maltrafis senriproĉan kulturan triumfon kaj ĝuon malofte riceveblan (vidu la supran recenzon). Se la publiko ne montras sian ŝaton kaj ne subtenas tiajn okazojn povos esti serioza bato al la estonteco de IAT.

Alia afero estas, ke al "Onklo Maroje", venis nur mil kongresanoj el kiuj duono foriris je la paŭzo kaj kelkaj (ekstreme malĝentilaj) eĉ antaŭ tio. Konsentite, ke la teatraĵo ne estis moderna kaj facila, konsentite plue ke la publiko havas rajton ŝati aŭ malŝati kion ĝi ricevas. Tamen, vere tamen, plurajn aferojn oni devas konsideri. Unue ĉiuj niaj teatraj prezentoj okazas en la plej malfacilaj cirkonstancoj, ni ne facilanime mortigu ilin. Due, kiel iam klarigis Zamenhof, la klasikaj verkoj en ĉiuj lingvoj postulas penon por kompreno eĉ de homoj kiuj denaske parolas ilin. Trie, se ne plaĉas la komenco, eble la fino pli ol kompensos. Kvare la elekto de ĉi tiu verko alportis grandan prestiĝon ekster la movado. Kvine, ĉu oni ne povas enkalkuli, ke la gvidanto de la teatro havas profesiajn, altajn kriteriojn kaj, se li ion elektas, oni ne facilanime kaj rapide malakceptu lian juĝon.

Ĉion ĉi dirinte, en iom neortodoksa komento pri la Esperantista publiko, mi volas fini per kelkaj vortoj direktitaj kaj al la aktoroj kaj al la Esperantistoj ĝenerale. Ŝajnas al mi, ke kompleta teatro enhavas du gravajn partojn, prezentistojn kaj publikon. En nia movado laŭ la nunaj cirkonstancoj, tiuj du partoj kontaktiĝas nur unufoje en la jaro. Por sukcesi la du flankoj devos esti komprenemaj por la neeviteblaj mankoj de la unuaj provoj kaj devas lerni kiel eble plej multon de iuj eraroj. Pro sia internacieco la Esperantistaro povas esti unu el la plej kleraj aŭdantaroj; pro sia lojaleco al la lingvo ĝi povas esti plej amika kaj facila publiko. Per komunaj klopodoj ni povos atingi teatron kiu kaj plaĉos al la publiko kaj havas altajn artajn meritojn.

---

## LA GAZETARA SERVO

Tra la tuta Kongreso S-ro M. Gjivoje kaj pluraj helpantoj pretigis bultenojn Esperantlingvajn kiujn ili dissendis al la Esperanta gazetaro. S-ro Sv. Ziegler klopodis pri kontaktiĝo kun la danaj gazetoj, organizis bonan gazetan konferencon kaj aldone al specialaj informoj dissendis du ampleksajn raportojn en la dana lingvo. La rezulto de ĉio ĉi estas, laŭ nia ĝisnuna scio, minimume 30 gravaj raportoj en la danaj gazetoj kaj regula Esperantlingva rubriko en la grava dana gazeto *Politiken*. Oni devas gratuli al ambaŭ sinjoroj por ĉi tiu valora laboro.

Tamen mankas io en nia dumkongresa porgazeta aktivo. La Esperantlingvaj bultenoj venas tro malfrue por helpi ĉe alilandaj gazetoj kaj la grandaj agentejoj ne sufiĉe uzas la nacilingvajn raportojn por sendado de eroj alilanden. Necesas, ke de ĉiu landa asocio oni sendu homon kun la aparta tasko elekti interesajn novaĵojn kaj sendi ilin al taŭgaj agentejoj eĉ al lokaj ĵurnaloj en sia lando.

## RADIO

La Pola Radio disaŭdigis regulajn informojn kaj utiligis la helpon de la *Danmark Radio* por dissendi la Solenan Inaŭguron nur kvar horojn post la okazo. Bonege!

## INFORMADO

S-ro Suckever, Prezidanto de la Israela Esperanto-Ligo, scias kapti okazojn. Survoje al la Kongreso li prelegis en la hebrea lingvo al 700 samŝipanoj pri Esperanto kaj ĝia praktika utilo.

## VIDITA EN LA KONGRESEJO

Anonceto kun la teksto: -
"Vivĝojo kaj Prudento ne en Cart sed en Bastien." supozeble aparta rendevuo.

## AŬDITA EN LA KONGRESEJO

— Unu aferon oni ne povas fari per Esperanto —
— Kion? — — Krokodili —.



*S-ino Merete Schneekloth, gvidantino de la Infana Kongreseto kun du el ŝiaj anoj.*

# PREMIOJ KAJ DIPLOMOJ

Por instigi al la Esperantistoj evoluigi siajn talentojn kaj por kuraĝigi nian literaturon ekzistas ne malmultaj premioj, diplomoj kaj honoroj. Kompreneble, en kunligo kun la Kongreso, oni multon aŭdas pri ili. Listo de premiitoj troviĝas en la apuda tabelo; sube ni mallonge raportas.

## BELARTAJ KONKURSOJ

La juĝadon jam faris Internacia Komisiono antaŭ la Kongreso. Dum la Kongreso en aparta kunsido, merkredon, je la 17a horo, la gajnintoj kaj la kongresanoj havis la okazon ekscii la rezultojn de la juĝado. S-ro Norman R. Smith prezidis (pro la bedaŭrinda foresto de kaj Prof. Waringhien kaj Mag. Auld) kaj en la mallonga tempo de unu horo anoncis la rezultojn kaj penis regali la aŭdantaron de proksimume 400 personoj per gustumo de la premiitaj verkoj. Legis kaj deklamis F-ino Marjorie Boulton, S-roj Roger Bernard kaj John Wells. S-ro Smith, kiel ĝisnuna estrarano por kulturaj aferoj esprimis sian plezuron pro la fakto, ke UEA povas regule organizi kaj trovi la monon por ĉi tiuj gravaj konkursoj.

## LA AŬTORO DE LA JARO: LA ARĜENTA SPRONO DE KOKO

Jam la kvinan fojon la eldonejo "Koko" aljuĝis ĉi tiun altprestiĝan premion. F-ino Marjorie Boulton, kiu anoncis la rezulton kiel reprezentantino de la eldonejo, klarigis, ke oni donas la premion por kuraĝigi novan talenton kaj originalan verkadon. Ŝi lerte resumis la enhavon kaj meritojn de la premiita verko kaj sprite defiis al la gajninto demeti sian maskon. La Arĝenta Sprono kaj la Diplomo atendos pretendanton en la eldonejo.

## LA LIBRO DE LA JARO

Ĉi tiu nova premio estos donita ĉiujare de la Esperanto Studo-Klubo (Londono). La celo estas elekti la verkon, kiu laŭ opinio de la klubanoj plej multon kontribuis al la antaŭenigo de Esperanto, ĉu en literaturo, ĉu en scienco, ĉu en ĝenerala kulturo, kaj sendepende de tio ĉu la verko estas originala aŭ traduka. La klubanoj ne limigos sin al nova talento kaj kun aplombo prijuĝos ankaŭ la leonojn de nia movado. Kvankam oni nomas la premion la Libro de la Jaro, oni ĉiam, por eviti la ellason de grava verko, enkalkulos pli longan periodon. La premio estas dudek kvin anglaj pundoj, kiujn ĉi-jare la gajninto propravole dividis kun la eldonisto, S-ro Régulo-Pérez.

---

### FILMPREZENTOJ

Dum la semajno oni kvarfoje havis la okazon partopreni duhoran filmprogramon. Ni ne ricevis raporton sed unu kongresano komentis, ke estas bedaŭrinde ne montri pli multajn filmojn kun Esperanta teksto. Ĉu li ne pravas? Espereble nia filmservo atentos ĉi tiun problemon.



*De ĉiuj ŝatata F-ino Margrethe Noll, pioniro de la dana movado, Honora Kongresanino, sidas inter du amikinoj.*

## ORATORA KONKURSO

Kvar junuloj malpli ol 28-jaraj, prezentis sin merkredon, je la 18-a horo, por elprovi sian oratoran talenton antaŭ la publiko kaj antaŭ la kritikaj okuloj de juĝkomisiono, S-roj Gunter Becker, Roger Bernard kaj Carlo Minnaja. Anoncante la rezultojn S-ro Minnaja laŭdis la kvaliton de la paroladoj. Sendube pro tio oni aljuĝis tri premiojn inter nur kvar konkursantoj. Certe niaj junuloj, kaj junulinoj, devus pli multnombre subtenu ĉi tiun gravan eventon. La nomo de la unua gajninto estos gravurita sur la pokalon "Ivo Lapenna" kaj li ankaŭ ricevos 150 guldenojn, la dua ricevos 100 kaj la tria 50 guldenojn.

---

## GRAVA FINANCA SUBTENO AL UEA

Dum la Kongreso oni povis anonci du gravajn ekzemplojn de vere efika subteno al UEA. La graveco kuŝas ne nur en tio, ke la rimedoj tiel ricevitaj efike helpos al nia laboro, sed ankaŭ en tio, ke la ricevitaj donacoj montras la altan takson de la membroj por la laboro farata.

La unua ekzemplo estas la entuziasma respondo de la membroj al la cirkulero petanta helpon por vastigi la aktivecon de la Asocio. Jam dum la kongreso oni povis raporti donacojn de pli ol 9000 guldenoj, ankoraŭ pluaj venas.

La dua ekzemplo estas la donacoj de po 5000 guldenoj por ĉambroj en la nova domo de UEA. Jam antaŭ la Kongreso oni donacis por tri ĉambroj kaj promesis tri pliajn. Dum la Kongreso mem envenis du pluaj monsumoj. Tuj post la elekto de la Estraro, S-ro Llech-Walter el Francujo anoncis ke tiel ĝojigas lin, ke Prof. Lapenna restas en la Estraro, ke li tuj donacos 5000 guldenojn. La sekvantan tagon, Ges-roj Derks el Monako donis leteron al la Ĝenerala Sekretario dirantan ke "kortuŝitaj pro la unuanimeco de la Komitato" ili donacos 5000 guldenojn por ĉambro en la domo de UEA. Entute do oni povas kalkuli je sep ĉambroj, sumo de 35000 guldenoj aldone al la multaj malpli grandaj donacoj. Tutkoran dankon al ĉiuj.

# PREMIOJ ANONCITAJ DUM LA 47-A UNIVERSALA KONGRESO

**Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 1962**

*Originala Poezio*

1. S-ro Sylla M. Chaves, Brazilo, por "Homara Epopeo"
2. S-ro Miyamoto Masao, Japanujo, por "Hajkoj"
3. S-ro Alvaro de Orriols, Francujo, por "ĉe l' laborej' de l' horloĝisto"

Honoraj Mencioj :

4. S-ino Clelia Conterno, Italujo, por "Aspazio"
5. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "Manifesto el la Nokto"

*Tradukita Poezio*

1. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "La edzino perdita" de William Barnes
2. (tri egalaj)
   F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "Mi estas" de John Clare
   S-ro Henry Fridén, Norvegujo, por "el Antonio kaj Kleopatra" de William Shakespeare
   S-ro Trygve Raimar, Norvegujo, por "Domo apud vojo" de Herman Wildenvey

Honora Mencio

5. S-ro Helmut Rössler, Germanujo, por "Carpe diem" (ĝuu la tagon)" de Martin Opitz

*Originala Prozo*

1. S-ro Albert Samyn, Belgujo, por "Abato Galiani: Lia signifo por Internacilingva Kulturo"
2. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "La sekreto de la lernejestrino"
3. S-ino Clelia Conterno, Italujo, por "Dometoj"

Honoraj Mencioj :

4. (du egalaj)
   S-ino Emilija Lapenna, Jugoslavujo, "Odo al Ĝi"
   D-ro Mario Sola, Italujo, por "Printempa Tago"

*Originala Dramo*

1. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "Nia Sango"
2. F-ino Marjorie Boulton, Anglujo, por "Homoj kaj Fantomoj"
3. S-ino Vesna Skaljer-Race, Jugoslavujo, por "Kafo"

*Premio "Nova Talento"*

D-ro Mario Sola, Italujo, por "Printempa Tago"

*Kongreslanda Branĉo*

Pro tro malfrua alveno de la manskribaĵoj oni ankoraŭ ne povis aljuĝi premion.

**La Arĝenta Sprono de Koko, la Aŭtoro de la Jaro**

S-ro Henri Baupierre (kaŝnomo) por la parodia verko "Specimene"

**La Libro de la Jaro**

Prof. Gaston Waringhien por la esearo "Lingvo kaj Vivo"

**Oratora Konkurso**

1. S-ro John Wells, Britujo, pri "Morala Respondeco de la Sciencisto"
2. F-ino Elisa Weide, Germanujo, pri "Etikaj valoroj el vidpunkto de la nuntempa junularo"
3. S-ro Diccon Masterman, Britujo, pri "Kial sporto ?"



*Serioza triopo; nomoj de maldekstre : — Marjorie Boulton, Julio Baghy kaj Marinko Gjivoje.*

**INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO**

Ĵaŭdon antaŭ la Kongreso unu kandidato provis sin je la skribaj demandoj por la Internacia Diplomo. Vendredon li sin submetis al parola ekzameno de tri anoj de IEK, D-ro Paul Neergaard, kiu prezidis, F-ino Marjorie Boulton kaj Prof. Ivo Lapenna. Kelkaj membroj de la publiko aŭskultis la parolan parton. La rezulton oni anoncos post pluraj semajnoj.

☆

**TIU ANGLA LINGVO!**

Sciante, ke la angla lingvo estas tre populara kaj supozeble bone konata en Skandinavio mi kolektis kelkajn ekzemplojn. Jen du el afiŝoj de oficialaj instancoj, do supozeble kontrolitaj kaj seriozaj.

1. *Folk Dances in Original Costumes* traduko : Popoldancoj en Novspecaj Kostumoj; supozeble la intenco estis ne *Original* sed *Authentic* (laŭtradicia)
2. *Announcement till June 1st. 1962 indispensable* nur angloj vere komprenos la ŝercon, enestas neniu ajn simileco al ilia angla lingvo. El la kunteksto mi deduktas, ke pli bonstila kaj pli informa estus

*The last date for enrolment is June 1st. 1962* sed tio estas nur diveno.

**NOTO DE LA REDAKCIO**

Pro neĉeesto de la redaktoro en Kopenhago ĉi tiun Kongresraportaron kunmetis Norman R. Smith.

# DUMKONGRESAJ LABOROJ DE LA KOMITATO KAJ ESTRARO DE UEA

Dum la Kongreso la Komitato laboris proksimume 21 horojn en 7 kunsidoj. Ĉeestis 50 komitatanoj aŭ rajtigitaj anstataŭantoj el eblaj 64. La Estraro laboris 9 horojn en 4 kunsidoj. Aldone 28 komitatanoj laboris en 4 komisionoj kiuj ĉiuj kunsidis dum 8 horoj aŭ pli kaj aldone estraranoj kaj aliaj ĉeestis tiujn kunsidojn por doni klarigojn aŭ informojn.

### DECIDOJ DE LA KOMITATO

La unua tasko de la 52 komitatanoj A kaj B estis elekti ĝis 13 komitatanojn C. Oni decidis elekti 10 kaj sekvis zorga diskuto pri la kandidatoj por certigi, ke laŭ la Statuto oni tiel havigus "la kunlaboron de spertuloj". Per sekreta voĉdono oni elektis S-inon E. Lapenna, F-inon C. Garrigue kaj S-rojn G. Becker, E. Dahl, H. W. Holmes, N. Minnaja, T. Sekelj, N. R. Smith, J. Thierry kaj E. L. M. Wensing.

S-ro Ernfrid Malmgren estis elektita Honora Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

Al la Honora Patrona Komitato oni elektis S-ron L. Elvin, Direktoron de la Instituto de Edukado de la Universitato de Londono, kaj D-ron W. Drees, Honor-Ministron kaj antaŭan Ĉefministron de Nederlando.

La Komitato malakceptis proponojn de A. Sekelj kaj F. Epstein rilate al ŝanĝoj en la Kongresa Regularo sed akceptis proponon de la Estraro, farita post diskuto kun LIBE, ke la kongresa kotizo por blindulo estu duono de la normala kaj, ke la akompananto de blindulo estu senpaga.

La Komitato tiam akceptis la aliĝon de la *Hungara Esperanto-Asocio* kaj la *Libana Esperanto-Asocio.* La dua havas malpli ol 150 membroj do sendos observanton al la Komitato dum la unua havas 1500 kaj tial du komitatanojn A. La tuta Komitato tiel konsistas el 64 anoj. La membraro de la Asocio samtempe altiĝas al pli ol 32,500.

La Komitato akceptis kontrakton de kunlaboro kun la *Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista.*

La Komitato starigis kvar Komisionojn por pli detala studo de certaj problemoj. Ili estis Elekta Komisiono, Financa Komisiono, Komisiono pri la Dua Baza Laborprogramo kaj Komisiono pri la Lerneja Kampanjo kaj la Eŭropa Lingvo-Kampanjo.

La Komitato detale trastudis la Estraran raporton kaj la financojn de la Asocio kun helpo de la raporto de la Financa Komisiono kaj aprobis la Estraran kaj Financan Raportojn tiel malŝarĝante la malnovan Estraron. Ĝi aprobis la buĝetojn por 1963.

La Komitato unuanime kaj sen sindeteno akceptis la jenan rezolucion de S-ro N. R. Smith (vidu la artikoleton, *Cirkuleroj).*

*La Komitato konstatas, ke en la lastaj monatoj estis dissendataj pluraj cirkuleroj, enhavantaj krom maljustaj personaj atakoj eĉ ofendajn kaj insultajn esprimojn kontraŭ elstaraj personoj en la movado kaj precipe kontraŭ la Ĝenerala Sekretario.*

*La Komitato senkompromise kaj forte malaprobas tiujn cirkulerojn kaj firme insistas, ke tia malutila praktiko por ĉiam malaperu el la movado kaj ke plena toleremo estu respektata en ĉiuj rilatoj de la diversaj instancoj de la Esperanto-movado.*

*La Komitato varme dankas al la estraranoj kaj speciale al Prof. I. Lapenna pro la grandega kaj laŭcela laboro, el kiu grandparte rezultis la nuna forta kaj prestiĝa pozicio de UEA kaj de la movado.*

La Elekta Komisiono proponis al la Komitato, principe esprimi sin pri kandidatigo de Prof. Lapenna kiel prezidanto. Per grandega plimulto (37 por, 2 kontraŭ, 3 sindetenoj) la Komitato akceptis tiun kandidatigon.
La Elekta Komisiono retiriĝis kun Prof. Lapenna kaj post konsulto kun pluraj komitatanoj proponis la Estraron jam priskribitan en la frontartikolo. Antaŭ la voĉdono Prof. Lapenna esprimis sinceran dankon pro la fido kiun donis al li la Komitato per la kandidatigo kiel prezidanto. Li decidis tamen rezigni pri la prezidanteco ĉar, liaopinie, estas ne nur problemo de prezidanto, sed ankaŭ problemo de ĝenerala sekretario. Tial, en la intereso de la Asocio, li estas preta ankoraŭ unu plian trijaran periodon plenumi tiun funkcion, se la Komitato povos akcepti la proponitan estraron, en kiu troviĝas kelkaj novaj personoj al kiuj li povos konfidi la pli teknikan parton de siaj taskoj. La Komitato unuanime kaj entuziasme akceptis ĝin. Prof. Lapenna dankis al la Komitato kaj klarigis, ke D-ro Hermann, pro okupiteco, kaj S-ro Smith, pro foriro al Gano, ne povis resti en la Estraro sed daŭre funkcios kiel komisiitoj. La Komitato dankis ilin pro pasintaj servoj.

La Komitato detale diskutis la Duan Bazan Laborplanon kaj, post amendoj kaj aldonoj ĉefe klarigaj pri rimedoj por plenumi ĝin, akceptis ĝin unuanime. Aparta artikolo kaj la plena teksto aperos en estonta numero de "Esperanto".

La Komitato akceptis la rekomendon de la kvara Komisiono daŭrigi la Lernejan Kampanjon kaj la Eŭropan Lingvo-Kampanjon. Ili sugestis diversajn metodojn por sukcesigi ilin.

La Komitato aprobis la tekston de la Kongresa Rezolucio raportita je la Solena Fermo.

### DECIDOJ DE LA ESTRARO

La Estraro decidis pri la teknikaj aranĝoj kaj tagordoj por ĉiuj oficialaj kunsidoj de la Kongreso.

La Estraro dividis la diversajn taskojn inter si kiel jam raportite en la frontartikolo. La komisiitoj ekster la Estraro restas plejparte kiel en la Jarlibro sed kun la jenaj notindaj ŝanĝoj. D-ro Hermann restas komisiito por la Eŭropa Lingvo-Kampanjo ekster la Estraro. S-ro N. R. Smith simile retenas la sekretariecon de la Komisiono "Oriento-Okcidento" kaj alprenas la Internacian Someran Universitaton de F-ino Marjorie Boulton, kiu jam fariĝis la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono. Oni elektis S-ron S. Mahant el Hindujo al la Komisiono, "Oriento-Okcidento".

Pri eldonaĵoj la Estraro alprenis plurajn gravajn decidojn kaj aŭdis raportojn pri multaj aliaj. La nova revuo "*Monda Kulturo*" aperos kvarfoje jare, la unua numero je la 15-a de Oktobro, 1962. S-ro W. Auld redaktos ĝin. Mendiloj estis jam dissenditaj. Nova internacia afiŝo estas presita kaj aĉetebla en du grandoj, oni fiksis moderajn prezojn. Broŝuro "*Esperanto-Lingvo por Afriko kaj por la Mondo*" jam aperis en la angla lingvo, franca eldono estas preparata kaj oni decidis eldoni araban. Oni ankaŭ esploros la eblon de suahilia eldono. Traduko de la UNESKO-libreto *Oriento-Okcidento* estas preskaŭ preta, kaj helpe de subvencio de UNESKO ĝi aperos la 20-an de Novembro. La dua libro en la serio "Oriento-Okcidento", *Kolekto de Japanaj Noveloj,* estas presata kaj la tria, *Naŭzo,* baldaŭ presota. Oni faros ĉion por anonci pluajn titolojn baldaŭ. La Estraro nomis D-ron V. Sadler redaktoro de *Esperanto* ek de februaro 1963, tiel liberiganta S-ron Auld por *Monda Kulturo;* post sia reveno el Cejlono D-ro Sadler laboros en la Centra Oficejo.

La Estraro decidis subteni la laborojn de D-ro Sadler en Cejlono per sendo de materialo kaj klopodo starigi libroperanton. S-ino Haudebine baldaŭ iros al Japanujo. Oni senpage sendos stokon de broŝuroj al S-ro Tibor Sekelj en Afriko kaj lasas al la Ĝenerala Sekretario esplori pri plua financa helpo.

Oni konfirmis,, ke dum la kongreso en Sofio okazu la Dua Arta Festivalo kaj ankaŭ konfirmis Hagon kiel kongresurbon por 1964. Oni detale studis la buĝeton por Tokio, 1965.

Multaj aliaj diskutoj kaj esploroj pri la Lerneja Kampanjo, pri Informado ktp. montros siajn rezultojn dum la venontjaraj laboroj.



*Sceno el ”La Respektema P...”*



*Ges-roj Suzuki, el Japanujo, dum la Balo.*



*Feliĉa japano, S-ro S. Kato inter du Eŭropaj sinjorinoj.*



*En la mezo: — F-ino C. Garrigue, la plej juna membro de la Komitato de UEA.*



*La Prezidanto de la Kongreso, H. W. Holmes, O.B.E.*

# KUNVENOJ DE FAKAJ KAJ NENEŬTRALAJ ORGANIZAĴOJ

Parte pro spacomanko, parte pro nekompleta informo, nur eblas tre koncize resumi ĉi tiujn gravajn partojn de la kongresa programo. Ni forte rekomendas al ĉiu fakulo aŭ homo kun aparta interesiĝo sin turni al la faka organizaĵo mem por pli detala informo kaj por doni al ĝi sian subtenon.

*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,* la Junulara Sekcio de UEA, okazigis kunvenon neformalan. Oni diskutis rilatojn inter TEJO kaj la internacia studenta organizaĵo de UN, kontaktojn kun internaciaj vojaĝasocioj kaj reprezentiĝon ĉe junularaj manifestacioj.

*Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj,* aliĝinta faka asocio, kunvenis dufoje. En la aferkunsido oni akcentis la gravecon de pluraj fakdelegitoj kaj de membriĝo al *International Law Association.* La publika kunveno al kiu oni invitis danajn fakulojn konsistis el prelego de Prof. Lapenna pri lastatempaj evoluoj en Soveta Juro. La prelego vekis viglan diskuton en la danaj gazetoj.

*Internacia Scienca Asocio Esperantista,* aliĝinta faka asocio, diskutis fakvortarojn kaj la dezirindecon de universitata centro. La skemo por faciligi transpagojn inter diversaj landoj bone evoluas kaj pluraj faksocietoj venas sub la ombrelo de ISAE tiurilate. Oni atentigis pri la prokrastoj en la aperigo de "Scienca Revuo" kaj esperis ordiĝon. (Ni aŭdis tiun rakonton plurfoje, nepre io estas farenda.)

*Internacia Federacio Esperantista Fervojista* kunvenis en ĉefa centro de la Dana Ŝtatfervojo kaj aŭdis teknikan prelegon pri pramservo inter Skandinavio kaj la Kontinento faritan en Esperanto de ne-Esperantista dana fervojisto. Poste oni vizitis instalaĵojn ĉe la ĉefstacidomo. Gratulinda interrilato kun samfakuloj ekster la movado.

*Internacia Geografa Asocio,* raportis pri sukcesa semajno en Husmandskolen apud Odense dum la semajno antaŭ la Kongreso. Tridek partoprenantoj aŭdis prelegojn, vidis filmojn kaj bildojn kaj faris ekskursojn. La prezidanto, Tibor Sekelj, sendis sonbendon el Etiopio. La jarkunveno dum la kongreso altigis la kotizon al 10 steloj.

*Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* okazigis tri kunvenojn dum la Kongreso, komitatan kunvenon, publikan kunvenon kaj pedagogian diskutkunvenon. Oni faris utilan kontakton kun S-ro Perrot la observanto de IFTA (Internacia Federacio de Instruistaj Organizaĵoj) kaj komisiis al S-ro Malmgren reprezenti ILEI ĉe tiu federacio. Oni raportis pri sukcesa porinstruista seminario en Pollando. La Ligo decidis laŭeble plenumi la Laborplanon de UEA. Oni elektis F-inon Nixon honora membro. Nova sekretario estas S-ro Svantesson, nova kasistino S-ino Leijder. Pedagogia diskuto okazis pri ne-Esperanta temo, *Frua Maturiĝo de Lernejanoj.* Oni ankaŭ diskutis novajn magnetofonajn metodojn por lingvoinstruado kaj la interrilaton inter Esperanto kaj aliaj lernejaj fakoj.

*Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj-Esperantistoj* anoncis, ke kredeble ĝis la venonta kongreso en Sofio oni povos anonci la eldonon de arkitekta fakterminaro. Vizito al konstruaĵoj en la urbo kontaktigis la membrojn kun Kopenhagaj samfakuloj.

*Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj,* okazigis la 32-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en la blindula Instituto de Kopenhago. La Dana blindula organizaĵo malavare subtenis la aranĝon. Partoprenis 70 personoj el 9 landoj. Oni faris du interesajn ekskursojn al blindula maljunulejo kaj al presejo kaj biblioteko por blinduloj. Oni decidis starigi rekomendojn por legaĵoj por blindaj komencantoj, klopodi pri la eldono de nova adresaro kaj doni aktualajn informojn pri blindulhelpiloj en *Esperanta Ligilo* la organo de LIBE. Oni rekomendis la ellaboron de laborplano konforma al tiu de UEA.

*Skolta Esperantista Ligo* alvokis por pli multaj naciaj agentoj.

*Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo* funebris pri la mortintaj Paul Ciliga kaj Kerrin Masterman. Okazis diskuto pri la temo, *Porprofesia preparado de Studentoj en la Nuna Altlernejo.*

*Esperanta Ŝakligo Internacia* alprenos laborplanon konforme al tiu de UEA. Okazis rapidmova turniro kun 8 konkursantoj.

*Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio* faris planojn pri pli vasta kaj efika agado. Ĝi alvokas al ĉiuj Esperantistoj-ĵurnalistoj aniĝi.

*La Universala Ligo* okazigis sukcesan kunvenon, kvankam ne povis ĉeesti estraranoj.

*Universala Medicina Asocio Esperantista* elektis novan prezidanton, Prof-on D-ron Masao Suzuki. Aperis 120 paĝa libro *Nia Korpo* de Prof. Nishi kaj *La vortoj uzataj en medicino* de Prof. Kato. Anatomiaj kaj fiziologiaj terminoj estas pretaj por la medicina vortaro. Oni okazigis viziton al modernega hospitalo en Glastrup.

*Veterana Esperantista Klubo* raportis pri adresaro de 615 nomoj. Ili penos rapidigi la konstruon de monumento al Zamenhof en Bialystok.

*Budhana Ligo Esperantista* emfazis la necesan toleremon de la budhana instruo.

*Kristana Esperantista Ligo Internacia* diskutis la temon *Al kiu apartenas la estonteco.* Aperos internacia religia kantaro. La kunveno finiĝis per prediko. Ankaŭ okazis Evangelia Diservo, dimanĉon, en la *Vor Frue Kirken.*

*La Internacia Esperanta Virina Komitato* okazigis kunvenon kun 35 partoprenantoj. Ili akceptis apartan deklaracion.

*Nacia Spirita Konsilantaro de Bahaanoj* okazigis diskutkunvenon sekvitan de lumbildoj.

*Universala Framasona Ligo* diskutis siajn internajn demandojn.

*Sendependa Ordeno de Oddfellow* kunvenis kaj diskutis la uzadon de Esperanto en siaj rondoj.

*Ornitologia Rondo Esperantista* okazigis sian unuan kunvenon. Ĝi aliĝis al ISAE sed diskutos rilatojn kun ne-Esperantistaj rondoj post du jaroj. Oni starigis komisionon por studi la nomenklaturon de birdoj en Esperanto.

*Mondpaca Esperantista Movado* volas pli intense kunlabori kun internaciaj Esperantaj organizaĵoj precipe UEA. Oni diskutis plibonigon de la revuo, *Paco.* Ekzemploj de bona kunlaboro inter orientaj kaj okcidentaj landoj montru la utilecon de Esperanto, sola propagando por kiu ajn sistemo estas malefika. En ĉiu lando estu komisiita reprezentanto de MEM.

*Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj* diskutis kampadajn problemojn. Oni petas liston de la bonaj kampadejoj en la kongreslando.

*Popoluniversitatoj.* Kunveno pri la Forumo de Romo, sukcesa apliko de Esperanto ekster la Esperanto-movado, altiris grandan atenton. La popoluniversitato de Firenze nun rajtas doni ŝtatajn diplomojn post Esperanto-kursoj. Kiuj volas kunlabori en la popoluniversitatoj de sia lando sin turnu al S-ro Petit en Francujo.

---

### EKSPOZICIO DE ESPERANTO-LIBROJ

Okazis tia ekspozicio, taŭge aranĝita de S-ro Solhauge, en la komunuma biblioteko de Kopenhago, kie ĝi estis vidata de ĉiuj regulaj vizitantoj. Rezulte, dum la tuta tempo ĉiuj Esperanto-lernolibroj, kiujn posedas tiu biblioteko — kaj ili ne estas malmultaj — estis daŭre forpruntitaj.

# ALIAJ EVENTOJ

AKADEMIO DE ESPERANTO

En ĉi tiu jaro oni ne okazigis publikan kunvenon. La sekretario raportis pri la nepublika kunveno, ke la diskuto rilatis al organizaj problemoj de nia supera lingva institucio. Ses akademianoj el ses landoj ĉeestis kaj rekomendis al la Akademio studi statutoŝanĝojn por permesi donon al nia institucio de la necesa aŭtoritato en la okuloj de la ekstera mondo.

LA INTERKONA VESPERO

Tre plaĉa senprograma vespero, kiu lasis al la kongresanoj interkoni sin aŭ rerenkonti sin. Por la pli timemaj, dancmuziko en flanksalono helpis al interamikiĝo, kiel ankaŭ la diversaj lokoj por sidi kaj trinki. Ne eblas longe raporti sed tio ne implicu ke la interkona vespero ne estas inter la plej gravaj aranĝoj de la Kongreso.

LA BANKEDO

Vere digna kaj neforgesebla festeno en plej eleganta salonego. Bona manĝo rapide kaj perfekte servata. Mi plej frandis la kukon "Thorvaldsen" bongusta komponaĵo el kremo, ĉokolado kaj pastaĵo.

LA BALO

Laciga kaj ĝuinda okazo, kun bona orkestro en agrabla salono. Dancemuloj kaj aliaj povis facile refreŝigi sin ĉe la restoracio aŭ en la trinksalonoj per kafo, limonado, glaciaĵo, kaj per pli fortaj likvaĵoj. Pro la ĉarmaj roboj kaj dignaj kompletoj, la salono aspektis vere ĉarma. Por la pli agaj aŭ nedancemaj estis grandaj balkonoj de kiuj rigardi la aliajn. Mi persone ne povis ne dancadi pro la allogaj sinjorinoj kaj la feliĉa kongresa atmosfero.

LA DANA MATINEO

Enhavis premiitan nacilingvan filmon verkitan de Eric Kirschner, *Historio de Unu Patrino.* La filmon oni enkondukis per antaŭa legado de la fabelo de Andersen, laŭ la Zamenhofa traduko. Poste S-ro H. V. Rasmussen prelegis kaj respondis al demandoj rilate Danlandon kaj ĝia nuna situacio.

LA 7-A INFANA KONGRESETO

Kvindek kvin infanoj el naŭ landoj denove partoprenis ĉi tiun ludan renkontiĝon, kiu samtempe ludas gravan porpacan rolon pro la kontaktiĝo en plej feliĉaj cirkonstancoj sen lingvaj bariloj. La multaj helpantoj meritas nian dankon pro sia utila kaj sinforgesa laboro. Plejparte la programo de la infanoj estis ilia privata afero kaj nur du fojojn la plenkreskuloj renkontis ilin. Merkredon okazis unuhora vizito kiam la infanoj montris desegnojn kaj prezentis konkursajn ludojn. Vendredon la infanoj reciproke venis al la Kongresejo kaj prezentis horon da ĉarmaj distraĵoj al la pli aĝaj Esperantistoj. Ĉio estis bone farita sed mi volas aparte mencii du erojn. Unu estas la prezento de dekminuta rakonto en klara kaj bela Esperanto fare de unu knabino dum la aliaj infanoj pantomime ilustris la okazaĵojn. La alia estas belvoĉa kantado de *Estas tru' en sitelo* perfekte parkerigita de knabo kaj knabineto nur sesjara.

JUNULARA VESPERO

Oni aŭdas, ke ĝi estis gaja, sed la detaloj estas ŝajne sekreto por ni kadukuloj.

BIERO

Du cent kongresanoj vizitis, kaj akceptis regalon, ĉe la fama *Carlsberg* bierfabriko.

EKSKURSOJ

Entute 470 Esperantistoj partoprenis kvar ekskursojn. Oni iris al Norda Selando, al Meza Selando, al atomesplora centro Risø kaj al Odense, la urbo de Andersen. Granda ĝuo por ĉiuj kaj senescepte la partoprenintoj laŭdis la aranĝojn kaj la vidindaĵojn. La organiza laboro estis tre granda kaj tre bone farita, la prezoj estis multe pli malaltaj ol tiuj de similaj ekskursoj komerce proponitaj al la publiko.

OFICIALA AKCEPTO

Proksimume 400 membroj de la Kongreso iris al Oficiala Akcepto en la Urbdomo, kie, en la nomo de la Urbestro, Urba Konsilanto, S-ro Ib Kolbjørn, bonvenigis la Kongreson. Li substrekis la gravecon de Esperanto kiel komunikilo inter homoj ĝenerale, ne nur inter iliaj gvidantoj. S-ro Holmes la Kongresprezidanto respondis. Sekvis regalo kaj vizito al la interesa kaj bela konstruaĵo.

LA KONGRESEJO

Flagoj en la antaŭplaco kaj afiŝo super la pordego de la Teknika Altkolegio indikis la lokon de la Kongresejo. Bedaŭrinde, sed por la LKK neevitebe, porripara trabaro malbeligis la eksteran aspekton. Interne la rotondo estis beligita per arbustoj inter kiuj, ĉe malgrandaj tabloj oni povis trinki, manĝeti, babili aŭ skribi. Sur tabloj en la balkonoj oni povis pli private aranĝi rendevuon aŭ pruntepreni skribmaŝinon. Sur la dua etaĝo oni povis lunĉi inter la 11-a kaj la 15-a je vere modesta prezo. La kutimaj budoj; Kaso, Informo, Rendevuo, Ekskursoj, Loĝigo, Fervojo, Banko kaj Poŝto efike funkciadis. La budo de UEA konstante laboris. Nekutimaj estis la ekspozicio de la Martinus-Instituto kaj la vendbudo de Madagaskaraj artaĵoj per kiu oni enspezis por tiea lernolibro. La plej impresaj budoj tamen estis la Librobudo kaj la apuda stando de Koko. Impresis riĉega stoko de ĉiaspecaj libroj inter kiuj elstaris la *Dana Antologio,* la nova *Marvirineto* kaj la kvar novaj libroj de Stafeto. Unu triumfa literaturamanto sukcesis kapti lastan ekzempleron de la delonge elĉerpita *Infana Raso.* La deĵorantoj faris meritAn bonan komercon tra la tuta semajno.

Oni konservis la tradicion nomi la diversajn salonojn laŭ pioniroj de nia movado sed por la unua fojo enkondukis la nomon UNESKO por la plej granda salono. Ĉu bona ideo ? Klaraj kaj zorge elpensitaj indikiloj montris la vojon tra la labirinta konstruaĵo. Vangofrapon al la malfortmensa spritulo kiu plurfoje mislokigis ilin.

Entute la Kongresejo estis tre inda kaj tre praktika loko por la laboroj, renkontiĝoj, ripozo kaj privataj aranĝoj de la kongresanoj. Ĝi estis bela, komforta kaj perfekte funkciis. Ĉar mi tri tagojn frue alvenis al la urbo mi havis okazon vidi kiel frumatene kaj tranokte la LKKanoj devis laboregi por ĉion pretigi. La LKK kaj iliaj helpantoj estu sincere gratulitaj.

---

KOMENTOJ PRI LA INAŬGURO

Juĝi eventon kiam oni helpas eĉ ete al ĝia aranĝo estas malfacile. Mi tial havigis komentojn de pluraj kongresanoj. Resume : -

*Germana Komencantino;* - plej forte impresita precipe de la festparolado kaj la multnacia sinsekvo de salutoj.

*Du poloj, ambaŭ spertaj Esperantistoj;* - unu multe ŝatis, trovis la aranĝon vigla kaj digna. La alia trovis ĝin ne tute konvinka kaj timis, ke la optimismo de la homoj trompis ilin, precipe dum la festparolado.

*Du britoj, ambaŭ multfoje en UK;* - unu tediĝas pro la sameco de la salutparoladoj, alia forte emociiĝas pro ili.

*Hungarino kaj Ĉeĥino, spertaj pri la lingvo sed malofte en UK* entuziasme laŭdas ĉion.

Kion konkludi ? Ĉefe ke, se mi pli multajn demandus, mi ricevus pli multajn opiniojn. Ĉu en estontaj kongresoj meti slipon en la Kongreslibro kaj peni ricevi pli ĝeneralan impreson ? Kiu scias, eble bona ideo rezultus.

**CIRKULEROJ**

En la raporto pri Decidoj de la Komitato oni trovas tekston de rezolucio pri cirkuleroj. Ĉar ne ĉiuj membroj estas vidintaj tiajn cirkulerojn kaj ne komprenos la gravecon de tiu rezolucio mi volas aldoni personan klarigon. Dum la lastaj monatoj tiaj cirkuleroj plenaj de personaj atakoj kaj ofendoj kontraŭ la laboremuloj kaj elstaraj personoj de nia movado vere malglatigis kaj malfaciligis nian laboron. Pluraj personoj ekdubis ĉu valoras daŭrigi sian laboron en tia atmosfero. Mi tial opiniis esence, ke ni fortranĉu ĉi tiun kanceron el nia movado por ebligi ian pluan progreson. Antaŭ ol elekti la novan Estraron, antaŭ ol plani la estontecon aparte necesis esti certaj, ke la Komitato de UEA firme malaprobas tiajn malhonestajn rimedojn kaj plene subtenas siajn funkciulojn kaj estraranojn. Oni povas nur ĝoji, ke la unuanimeco de la Komitato kaj la unueca etoso de la Kongreso ebligos al la Asocio antaŭeniri fidante al la subteno de la tuta Esperanta movado.

Ĉi tiu rezolucio kaj la posta proponita de la Elekta Komisiono aparte aludis al Prof. Lapenna, kiu, kiel la plej aktiva estis la plej atakita. Per malaprobo de la cirkuleroj kaj posta preteco sekvi Prof-on Lapenna kiel Prezidanton, la Komitato ebligis la elekton de la nuna Estraro, orientigis sin kaj la Asocion rilate la agadmetodojn kaj laborplanon kaj sekvis la evidentan volon de la Esperantistaro daŭrigi la ĝisnunajn sukcesajn gvidliniojn de UEA. **La rezolucio tial ne estas ia flankafero sed esenca paŝo por progresigo; ĉiuj individuoj, instancoj kaj organizaĵoj bonvole ĝin atentu.**



*La Scienca Konferenco*

Klare komprenu, ke mi ne kritikas la uzadon de cirkuleroj kiel rimedoj prezenti argumentojn pri principoj aŭ pri teknikaj problemoj. Tiaj cirkuleroj havas valoron. Se oni evitas personajn atakojn, sendas la cirkuleron ne sekrete sed al la koncerna instanco, kaj unue, antaŭ ol sendi kritikan cirkuleron, penas interkompreniĝi rekte kun la koncerna persono aŭ instanco, tiel ne venos malutilo.

La rezolucio akceptita de la Komitato, klare indikas kiajn cirkulerojn oni kondamnas. Nur tiuj kies konsciencoj estas malpuraj bezonas senti kulpon. De la tuta mondo ni nun esperu amikan kaj feliĉan kunlaboron al nia komuna celo.

Norman R. Smith




*La Infana Kongreseto, antaŭ sia Kongresejo*

# LA UNUA INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCO

**en kunligo kun la 15-a laborperiodo de la**

# INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

Ĝenerala revuo, kia estas "Esperanto", ne estas loko por plene raporti pri ĉi tia konferenco. Fakuloj interesitaj devos sin turni al la plenaj raportoj eldonotaj en Esperanto en "Scienca Revuo" aŭ en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj kiel dokumentoj de CED. Tamen se ni flankenlasas la sekajn teknikajn detalojn kaj konsideros nur la ĉefajn ĝeneralajn rezultojn de la Konferenco, tiam ni certe povos raporti pri aferoj ne nur interesaj sed ankaŭ gravaj por la nefaka Esperantisto. Pro tio, ke ĉiuj prelegoj de la Internacia Somera Universitato estis ĉijare ligitaj al la temo de la Konferenco, ni ne raportos pri tio aparte sed en kunligo kun ĉi tiu raporto.

Tri esence gravaj punktoj, rilate al kunlaboro kun ne-Esperantistaj sciencistoj estas notindaj. La unua estas, ke dum sufiĉe longa tempo la fama *Max Planck Instituto* en Germanujo serioze pripensis la utilon de Esperanto por bibliotekaj kaj indeksaj laboroj en internacia scienco. Baldaŭ ili devos fari decidon. Kiel vi sube legos la Konferenco faris sian eblon por faciligi la uzadon de Esperanto en ĉi tiu maniero. La dua estas, ke *la Scienca Konsilantaro de la Instituto de Geografio de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio* sendis rezolucion sian al la Konferenco en kiu ili notas la signifoplenan helpon kiun Esperanto povas doni al geografoj en interŝanĝo de faka informo kaj agnoskas la dezirendecon de rondeto en sia Instituto por esplori la praktikan uzon de Esperanto en geografio. La tria estas, ke ne-Esperantista sciencistino, Prof. Elli Saurio de la Universitato de Helsinki, ne nur pretigis raporton por la Konferenco (ĉar tion oni ja invitis) sed efektive partoprenis la Konferencon kaj laŭtlegis la propran kontribuon. Tio ja montras, ke efektive Esperanto estas tuj uzebla kun minimuma preparo de iu ajn sciencisto en faka konferenco.

Unu interesa grupo de temoj estis tiuj pri maŝina tradukado kaj aŭtomata dokumentado. Oni povis klare konkludi de la diskuto, ke maŝintradukado ne estas rivalo de Esperanto sed povos grave helpi al la enkonduko de Esperanto en sciencaj rondoj. Plue estas tute klare, ke Esperanto certe povos helpi en la uzo de trumaŝinoj por indeksoj, dokumentado, multlingvaj vortaroj ktp. kaj ke efektive ĝi multrilate pli taŭgas por tio ol ajna nacia lingvo. Esperanto ankaŭ povos rekte helpi pro sia strukturo en la studo kaj evoluigo de maŝintradukado. Oni starigis laborgrupon por antaŭenigi la aplikadon de Esperanto en ĉi tiuj sferoj. Unu malfacilaĵo estas, ke multaj el la normaj maŝinoj uzataj por dokumentado kaj elektronaj kalkuliloj ne povas kontentige pritrakti supersignitajn literojn (ekz. la maŝinoj en *Max Planck Instituto*). Por tiu limigita celo la Konferenco rekomendis la uzon de x anstataŭ ˆ kaj w anstataŭ ŭ. Estu klare komprenite, ke tio ne rilatas al la literatura lingvo, nek al ĉiuj maŝinoj ĉar aliaj maŝinoj povas prezenti aliajn problemojn. Oni asertas, ke post malmultaj jaroj da kontentiga eksperimenta uzo de Esperanto en ĉi tiu formo estos normale ordoni al la maŝino represi cx kiel ĉ ktp. Intertempe la Zamenhofa solvo de h post la litero estas ambigua en ekzemple "flughaveno" kaj tial ne estas uzebla de tiaj maŝinoj.

Alia laborgrupo starigita estis por la studo de vulgaraj nomoj de bestoj kaj organismoj. Ĉu tio estas paŝo al nova per-Esperanta klasifiko de bestoj aŭ ĉu nur rimedo utiligi Esperanton en kunligo kun la nunaj Latinaj nomoj estis temo forte pridisputata. Ĉiuj tamen konsentas pri la graveco de ĉi tiu laboro.

Oni konstatis, ke laborgrupo pri geografiaj nomoj jam ekzistas kaj emfazis la gravecon de tiu laboro.

La Konferenco akceptis la dezirindecon de Internacia Universitato instruanta internacian studentaron per Esperanto. Ili akceptis plurajn gvidprincipojn por la starigo de tia Universitato. Ekzistis tre diversaj opinioj pri la praktikaj ebloj tion fari; de la kredo, ke oni povus jam nun starigi tian Universitaton ĝis la forta dubo, ke iam ajn la necesaj monaj rimedoj estus haveblaj. Tamen oni atentigis pri pluraj favoraj faktoroj precipe pro la lingva problemo en scienco kaj decidis starigi laborgrupon por pli detale studi rimedojn, lokon, financon, kiujn kaj kiom multajn fakojn ktp. En la unua momento parto de la laboro povus esti perkoresponda kiel en universitato en Sudafriko, sed principe tio povas esti nur parto kaj ĉiu studento devos pasigi certan tempon ĉe la universitato mem. Oni ankaŭ petis al la estraro de ISAE esplori la demandon.

Oni ankaŭ diskutis medicinajn terminojn, la uzadon de Esperanto en matematikaj kaj eksperimentaj sciencoj, la aldonon de Esperanto al multlingvaj vortaroj, unue kiel plua traduklingvo poste kiel indekslingvo, la uzon de Esperanto en juro kaj en internaciaj rilatoj, la procentaĵojn de sciencaj verkoj eldonitaj en diversaj lingvoj, lingvosciencajn vortarojn, la dezirindecon de kaj la rimedojn por ĉiea aperigo de Esperantlingvaj resumoj kaj multajn aliajn detalajn kaj teknikajn demandojn.

Interese el la ĝenerala vidpunkto estis la relative malaltaj procentoj de sciencistoj kiuj komprenas eĉ pasive la tiel nomatajn "grandajn lingvojn"; ciferoj cititaj estis bazitaj sur esploro de UNESKO. La ekonomia avantaĝo de Esperanto kiel pontlingvo precipe por la malgrandaj nacioj estis skize menciita.

La Konferencon partoprenis nur kvalifikitaj sciencistoj, multaj el kiuj havas mondan reputacion en siaj fakoj. Dudek ses traktatoj preparitaj antaŭe formis bazan dokumentaron por la diskuto. La taŭga aranĝo de la Konferenco kaj la science utilaj rezultoj permesos pluan efikan kontakton kun sciencistoj ekster la movado kaj kvankam relative malmultaj ne-Esperantistaj sciencistoj kontribuis al la Konferenco, la antaŭaj invitoj sendube vekis atenton en sciencaj rondoj.

Entute oni devas konkludi, ke, kiel unua, la Konferenco plenumis sian rolon kaj ke estontaj similaj konferencoj havos la eblon de pli grandaj sukcesoj. La materialo de la Konferenco taŭge eldonita estos utila por plua penetrado en sciencajn mediojn. Pri la teknikaj kaj sciencaj rezultoj, estas ripetinde, ke necesos konsulti la fakajn eldonaĵojn.

**RAPORTOJ AL LA KONFERENCO**

Ivo Lapenna : *La lingva problemo en la internaciaj rilatoj*
Vilho Setälä : *Lingvo kiel instrumento de scienco*
W. De Smet : *Lingvaj problemoj en Belgio koncerne la sciencon*
A. Albault : *Statistika studo pri la medicinaj revuoj aperantaj en la mondo*
V. Sadler : *Aŭtomata traduko*
Erik Høg : *Apliko de Esperanto ĉe maŝina tradukado de lingvoj*
G. Natalis : *Multlingvaj vortaroj per Esperanto kiel sistemlingvo kaj per apliko de Hollerith-maŝinoj*
H. D. Neumann : *Aŭtomatisma dokumentado de scienca, teknika kaj komerca literaturo pere de Esperantlingvaj referatoj kaj per apliko de teletajpiloj, Hollerith-maŝinoj kaj elektronaj kalkulmaŝinoj*
A. Albault : *Alvoko pri alfabeta eksperimentado*
W. J. Nijveld : *La elparolo de literoj en Esperanto*
J. Semmelik : *Internacia Esperanto-Universitato*

Paul Neergaard : *Internacia Esperanto-Universitato de J. Semmelik (Komentario al)*

Ivo Lapenna : *Kelkaj aspektoj de la lingva problemo en Internacia Publika Juro kaj Kompara Juro*

Instituto de Geografio de la Akademio de Sciencoj, Sovetunio : *Rezolucio*

D. L. Armand : *Problemo de internacia lingvo en geografio*

D. L. Armand : *Transskribo de geografiaj nomoj en Esperanto kaj ĝia uzo por ordigo de nacilingvaj transskriboj*

Paul Neergaard : *Lingvaj problemoj en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj*

C. Støp-Bowitz : *Kiel nomi la organismojn ?*

W. De Smet : *Konsideroj pri la biologia nomenklaturo*

Hideo Yagi : *Valoro de Esperanto por internacia evoluo de medicino*

Pablo Santamaria-Arnaiz : *Lingvaj Problemoj kaj Internacia Diverseco en la Anatomia Priskribo*

Bož. Popović : *Lingva problemo en matematikaj kaj fizikaj sciencoj*

Y. Väisälä : *Esperanto en astronomia uzo*

Erkki Kääriäinen : *Spertoj de geodeziisto*

W. P. Roelofs : *Patentoj kaj diverslingveco*

Elli Saurio : *Lingvaj problemoj en la mastrumada ekonomio*

# LA SOLENA FERMO : LA KONGRESO DE UNUECO

Malfermante la kunsidon S-ro H. W. Holmes, Prezidanto de la Kongreso, substrekis, ke estas tre malgaja momento kiam oni adiaŭas amikojn.

Via raportanto deziras aldoni, ke estas precipe tiel post kongreso ĉi tia. Tra la tuta semajno, malgraŭ la multaj problemoj, la Komitato kaj la kongresanoj, per sia sinteno en la publikaj kunvenoj, per sia atento al la kunsidoj de la Komitato kaj per sia entuziasma subteno al la gvidantoj de la Asocio, faris el ĉi tiu decida kongreso kongreson de unueco. Tiu sento de unueco estis la elstara emocio de la ferma kunveno.

La prezidanto petis al la Ĝenerala Sekretario raporti la decidojn de la Komitato kaj Estraro kion li tre koncize faris (vidu apartajn raportojn). Li prezentis la personecojn de la nova Estraro kaj laŭtlegis la tekston de la rezolucio de S-ro N. R. Smith, akceptita de la Komitato. La ĉeestantoj entuziasme aplaŭdis la informon pri du pluaj ĉambroj por la Domo de UEA. La parolanto laŭtlegis la tekston de la Kongresa Rezolucio, kiu resumas la nunan akran lingvosituacion en la mondo kaj la laborojn de la Kongreso. La ĉeestantaro aklame aprobis ĝin. La Rezolucio tekstas :

La 47-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Kopenhago de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto, 1962 kun la partopreno de 1550 reprezentantoj el 40 landoj de ĉiuj kontinentoj

1) konstatas, ke la lingva problemo en la internaciaj rilatoj akriĝas de jaro al jaro kaj atingis tian stadion, ke radikala kaj definitiva solvo devas esti urĝe trovita,

2) notas la fakton, ke en 75 jaroj de sia ekzistado kaj ĉiam pli vasta aplikado en la internacia praktiko, Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon kun propra vere internacia spirito kaj fariĝis jam vere matura kiel instrumento de internacia komunikado, arta esprimilo kaj lingvo de la scienco, kiel tion ankoraŭfoje atestas la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, ĵus fininta siajn laborojn en Kopenhago.

3) esprimas tial sian firman konvinkon, ke el pure teknike lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia vidpunktoj la akcepto de la Internacia Lingvo Esperanto por ĉiuj formoj de internaciaj rilatoj prezentas la solan justan kaj efikan solvon de la lingva problemo en la intereso de ĉiuj rasoj, nacioj kaj sociaj tavoloj,

4) atentigas pri tio ĉiujn interesitajn internaciajn kaj naciajn instancojn, insiste petas ilin plej zorge konsideri la eblecojn, kiujn prezentas la Internacia Lingvo Esperanto kaj rezulte enkonduki la Internacian Lingvon en la lernejojn,

5) alvokas la Esperanto-organizaĵojn plenumi per komunaj fortoj la unuanime akceptitan Duan Laborplanon de UEA, kies fina celo estas ĝeneraligi la uzon de la Internacia Lingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj.

Post sia resumo de la decidoj faritaj dum la Kongreso, Prof. Lapenna memorigis al la ĉeestantoj, ke nur kun granda malfacileco oni trovis kongresurbon. Pro diversaj kialoj la aniĝo estas malpli granda ol oni esperis kaj tial minacas deficito. Li ripetis sian pledon por mondonacoj al tiuj kiuj ne aŭdis ĝin antaŭe kaj la tuja monkolekto enspezis 2400 danajn kronojn. Kun la antaŭa kolekto la sumo donacita estas 4200 danaj kronoj. Tio kredeble ne tute forigos la deficiton sed klare montras la ŝaton de la kongresanoj por la laboro de LKK.

S-ro Holmes nun esprimis dankon al la LKK por ĝia granda kaj sukcesa laboro en malfacilaj cirkonstancoj. D-ro Paul Neergaard, la prezidanto de LKK, respondis kaj aldonis dankon al la multaj aliaj helpantoj kaj al la Estraro pro bona kunlaboro.

S-ro Norman R. Smith prezentis la premiojn en la *Belarta Konkurso* kaj anoncis la rezultojn de la premioj *Aŭtoro de la Jaro* kaj la nova *Libro de la Jaro*. (vidu apartan raporton). S-ro Carlo Minnaja anoncis la rezultojn de la *Oratora Konkurso* kaj transdonis la pokalon *Ivo Lapenna*. (vidu apartan raporton).

S-ro Oljanov, kiel reprezentanto de la LKK en Sofio invitis al la kongresanoj veni amase al la 48-a Universala Kongreso. Li promesis ĉarman naturon, belan sunon kaj malmultekostajn hotelojn. La ses societoj per siaj 2000 Esperantistoj faros sian eblon sukcesigi la Kongreson kaj la kunligitan Duan Artan Festivalon. Li formale transprenis la Kongresan standardon, de D-ro Paul Neergaard.

S-ro Holmes nun transdonis la martelon al Prof. D-ro Hideo Yagi, la nova Prezidanto de UEA, kiu, dankinte pro la honoro kaj esprimінte la esperon, ke ĉiuj subtenos lin en la granda kaj grava laboro, frape fermis la Kongreson. Kantinte la himnon la kongresanoj disiĝis ĝis estonta okazo.

# PENSOJ PRI LA INTERNACIA DIPLOMO

Eble kelkaj kongresanoj dum la pasinta kongreso en Kopenhago legis en la kongreslibro la rubrikon "Internacia Ekzameno". Eble du-tri demandis al si pri kio temas, la plej multaj tamen sendube preteriris ĝin, ĉar tiu nia internacia ekzameno ne vekas sufiĉan atenton. Ĝis nun prezentis sin kvin kandidatoj, tri pluaj volis fari la ekzamenon sed pro malsano aŭ alia kialo retiriĝis lastmomente. Tamen jam okazis la tria ekzameno. En la unuaj du jaroj unu el kvar kandidatoj sukcesis.

Kompreneble oni devas konkludi, ke tia malgranda interesiĝo indikas ian malsukceson en niaj planoj por la ekzameno. Ni certe esperis, ke post tri jaroj estus pli ol manpleno da sukcesintoj kiuj posedus La *Internacian Diplomon pri Supera Instrukapablo de la Internacia Lingvo Esperanto.* La celoj de la Internacia Ekzamena Komisiono estas altigi la nivelon de instruado de Esperanto kaj per rigora ekzameno atesti la kapablon pri supera nivelo de scio kaj instruo. Malantaŭ la projekto de tia ekzameno estas la bezono, ke por efika laboro en altlernejo kaj universitatoj kaj por ĝenerala oficialigo de la instruo de Esperanto necesas tia *internacia* normo. Oni esperas, ke la posedantoj de la *Internacia Diplomo* formos eskadron de nedubeble kapablaj Esperantistoj, kiuj ne nur estos fidindaj kompetentuloj pri la lingvo, ĝia kulturo kaj evoluo, kaj pri la movado, ĝia historio kaj organizo, sed ankaŭ estos kapablaj instrui la lingvon je la plej superaj niveloj kaj kapablos kompetente prezenti ĝin kaj la movadon en intelektaj rondoj. Tiaj celoj estas klare tre dezirindaj.

Evidente, kun nur unu diplomito, la IEK ne ĝis nun plenumis ĉi tiujn gravajn celojn, kaj ni devas esplori la kialojn de ĝia malsukceso. La ekzameno estas rigora, eĉ severa, sed tia ĝi devas esti por plenumi la intencon, kaj plue tia rigoreco estas efektive la kvalito pri kio posedanto de la *Diplomo* povos plej fieri. Oni devas kompari la postulojn de la internacia diplomo kun la postuloj por diplomo pri nacilingva kompetenteco de samnaciano. Ja oni devigas al la kandidatoj multe labori, kio fortimigas kelkajn, sed precize la laboremajn kaj studemajn oni volas allogi.

Ĉu la ekzameno estas sufiĉe vaste konata, ĉu ĝia prestiĝo estas sufiĉe alta? Rilate al prestiĝo memoru, ke nur unu el kvar tre kompetentaj kandidatoj sukcesis ĝis nun. Rilate al reklamo, ni en UEA faris nian eblon kaj estas por landaj asocioj, akademiaj kluboj ktp. vastigi la informon pri la diplomo kaj alpreni kiel celon, ke pluraj el siaj plej kapablaj pli junaj membroj akiru la *Diplomon.*

Multaj eblaj kandidatoj hezitas ĉar ili ne konas sufiĉe bone la sciojn bezonatajn por la ekzameno. Aliflanke la reguloj kaj studobjektoj estas eldonitaj, ekzistas listo de rekomenditaj legaĵoj, oni povas vidi specimenajn skribajn ekzamenojn kaj okaze de ĉiu universala kongreso la publiko povas aŭdi la buŝan parton. Por informo pri la ekzameno, kopioj de la reguloj ktp. skribu al la sekretariino de IEK (adreso en la Jarlibro). Ke kelkaj samideanoj volas scii pli multon pri la studprogramo atestas du petoj venintaj al la Estraro de UEA. La unua estas peto starigi korespondan kurson por la ekzameno; tion la Estraro malakceptis kiel nek praktikan nek akordan kun la intenco kaj naturo de la *Diplomo.* La dua estas deziro partopreni seminarion pri la diplomo. Tion la Estraro estus preta organizi sub certaj kondiĉoj. La seminario pagu siajn kostojn, kompetentaj prelegantoj konsentu gvidi ĝin, estu sufiĉa interesiĝo, ĉiuj komprenu ke tia seminario ne povas pretigi kandidatojn por la Diplomo, nur skizi por eventualaj kandidatoj sekvindajn studprogramojn. Se tia seminario interesas vin, skribu al D-ro Albault, la nova estrarano pri kulturaj aferoj (adreso en Jarlibro).

